

UNESKO-jaro de la indiĝenaj lingvoj 2019:

2680 lingvoj estas en danĝero!

Lingvoj de centoj da etnaj minoritatoj kaj indiĝenaj popoloj tra la mondo estas draste minacataj

Kiel oni povus savi elmortantajn lingvojn kaj sekurigi lingvajn rajtojn

De Andreas Künzli

Laŭ aktuala koncerna statistiko de Unuiĝintaj Nacioj, en la mondo ekzistas 7000 lingvoj. En 90 landoj vivas 370 milionoj da anoj, kiuj apartenas al indiĝenaj popoloj. Inter tiuj 7000 lingvoj 2680 estas koncernataj de la elmortado. Plej ofte temas pri la idiomoj de indiĝenaj popoloj.¹

Laŭ statistike, ĉiun duan semajnon elmortas iu lingvo. Tiel, ĝis la fino de la 21a jarcento restos verŝajne nur ĉirkaŭ 3000 lingvoj sur la tero. Plej forte koncernataj estas tiuj lingvoj, kiuj estas parolataj de malpli ol mil homoj. Tio estas 28 procentoj de ĉiuj lingvoj, precipe inter la indiĝenaj popoloj.

Kialoj por la elmortado de lingvoj

Krom la iama perforta koloniisma lingvopolitiko en multaj landoj de la mondo, en kiuj la pli aŭ plej granda etno kutimis trudi sian („superan“) lingvon al la („primitivaj“) minoritatoj, kiujn oni preferis kruele subpremi aŭ eĉ genocide elradikigi, ekzistas ankaŭ kaŭzoj por la elmortado de lingvoj, kiujn oni devas serĉi inter alie ĉe la indiĝenoj kaj lingvaj minoritatoj mem, sen doni al ili la tutan kulpon pri la mizero de ilia situacio. Anoj de minoritataj lingvoj ofte estas konvinkitaj pri tio, ke iliaj ŝancoj kaj perspektivoj trovi utilan lokon en la kleriga sistemo kaj labormerkato estas malgrandaj. Ili do ofte ne plu kredas je la estonteco de la propra origina idiomo kaj decidas rezigni pri ĝia uzado por eviti malavantaĝojn kaj diskriminadon.

Pli precize la kialoj de la elmortado de minoritataj lingvoj povas esti analizataj kaj komprenataj, se oni esploras la tutan vicon de cirkonstancoj de la malfortiĝo aŭ malrapida malapero de certaj lingvoj.

La *Atlaso de la minacataj lingvoj de UNESKO*² distingas kvin gradojn de minaciteco. Koni la klarigojn de la koncernaj cirkonstancoj estas tre utile, ĉar la klarigoj enhavas kaŭzojn de la ekzistoproblemoj por la koncernaj indiĝenaj lingvoj.

Minacata (angle: vulnerable) estas lingvo, se la infanoj ja parolas la propran indiĝenan gepatran lingvon, sed nur en limigataj medioj, ekzemple en la hejmo de la gepatroj.

Tre minacata (severely endangered) estas lingvo, se la infanoj ne plu lernas la koncernan indiĝenan lingvon kiel gepatran en la hejmo de la gepatroj.

Forte minacata (severely endangered) estas lingvo, se la geavoj kaj la pli maljuna generacio ja parolas la propran lingvon kaj se la generacio de la gepatroj ankoraŭ komprenas ĝin, sed ne plu parolas ĝin inter si aŭ kun la infanoj.

Severe minacata (critically endangered) estas lingvo, se la plej junaj parolantoj ne plu, nekomplete aŭ nur malofte parolas la propran familian lingvon.

Kiel *elmortanta* (extinct) lingvo estas konsiderata, se la parolantoj de tiu lingvo ne plu ekzistas.³

Kiel *sekura* lingvo estas konsiderata, se ĝi estas parolata de ĉiuj generacioj kaj heredigata al la pli junaj generacioj. Fakte, multo dependas de la volo de iu popolo konservi sian lingvon mem. Plej grave estas, ke la geavoj kaj gepatroj pludonas sian lingvon al la infanoj. En tia kazo indiĝena popolo, kiu

¹ Vd. <https://en.iyil2019.org>. Ĉiuj ciferoj menciitaj en ĉi tiu teksto estas malekzaktaj, proksimumaj, provizoraj. Por la aktualeco kaj ĝusteco de la informoj kaj indikoj garantio ne povas esti donata, kvankam ili estas ĉerpitaj el kredindaj fontoj.

² Vd. <http://www.unesco.org/new/en/culture/themes/endangered-languages/atlas-of-languages-in-danger>.

³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Bedrohte_Sprache.

havas nur 60 anojn, povas esti kapabla konservi sian lingvon, se ĝi aktive deziras tion, dum iu alia popolo kun 10 mil anoj povas perdi ĝin, se ĝi konsideras sian lingvon nekonservinda aŭ -ebla.

Tio aktuale okazas ekzemple en norda Ĉinio en la kazo de la *salara* lingvo, kiun parolas nur la anoj de la generacio, kiu estas pli ol 65-jaraĝa, dum ĉiuj pli junaj anoj de tiu popolo adoptis la *mandarenan* lingvon, ĉar la gepatroj konsideras sian indiĝenan lingvon senvalora kaj do superflua kaj instigas siajn infanojn lerni nur la mandarenan por promesi al ili „pli bonan“ estontecon. Ĉi tiuj esence socioekonomiaj konsideroj estas grava kaŭzo por la elmortado aŭ konservado de minacataj lingvoj.

Lingva situacio en Eŭropo

Certe, la plimulto de minacataj lingvoj estas parolataj de indiĝenaj popoloj en Afriko, Azio kaj Latinameriko. Sed laŭ la menciita *Atlaso de minacataj lingvoj de UNESKO* ankaŭ en Eŭropo ekzistas multaj lingvoj de malgrandaj popoloj, kies ekzisto estas minacata.

Temas pri tiaj lingvoj kiel la *vaska* (aŭ *eŭska*, kvankam ĝin parolas takseble 670 mil homoj),⁴ *kimra*,⁵ *alemana* (en Germanio kaj Alzacio/Francio, vd. sube), *bavara*,⁶ *frankonia*,⁷ *platdiĉa*,⁸ *okcidentfrisa*,⁹ kiuj estas minacataj laŭ kategorio 1, kiel la *aragona*,¹⁰ *aromuna*,¹¹ *burgenland-kroata*,¹² *frankprovenca* (vd. sube), *friula* (vd. sube), *irlanda*,¹³ *istorumana*,¹⁴ *jida*,¹⁵ *korsa* (vd. sube), *dolomitladina* (vd. sube), *ligura*,¹⁶ *soraba* (vd. sube) *piemonta* (vd. sube) *romaa*,¹⁷ *retoromanĉa* (vd. sube), *skota*,¹⁸ *transilvania saksa*,¹⁹ kiuj estas minacataj laŭ kategorio 2. Laŭ la pli malbona kategorio 3 estas koncernataj lingvoj kiel la *bretona* (kvankam ĝin parolas takseble 250 mil homoj),²⁰ *valona*,²¹ *sarda* (vd. sube), *gagaŭza*,²² *karaima*,²³ *kaŝuba* (vd. sube) *krime-tatara* (vd. sube), *judhispana (sefarda)*,²⁴ *liva* (vd. sube), *nordfrisa*,²⁵ *okcitana* (kvankam ĝin parolas aŭ scipovas takseble 2-3 milionoj da homoj),²⁶ sed ankaŭ la *provenca*,²⁷ *supera silezia* (vd. sube) kaj diversaj *francaj dialektoj*. Kategorio 4 aŭ 5 koncernas minoritatajn lingvojn, kiuj estas praktike mortaj; esence temas pri la *kornvala*,²⁸

⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Basque_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=obpbvsdd1kk->

⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Welsh_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=2pOIQ-1rJxQ>.

⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Bairische_Dialekte; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=oaXjWjKPHOo>.

⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Fränkische_Sprachen.

⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Niederdeutsche_Sprache.

⁹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Westfriesische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=EeiUb1z2DJk>.

¹⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Aragonese_language

¹¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Aromanian_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=YZg5vnJB8B8>.

¹² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Burgenlandkroatische_Sprache.

¹³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Irish_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=aEtuJ229e_w.

¹⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Istro-Romanian_language.

¹⁵ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Jiddisch>.

¹⁶ Vd. https://it.wikipedia.org/wiki/Lingua_ligure.

¹⁷ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=VTOuAsV4G2w>.

¹⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Scots_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=zTu2EKJQu84>.

¹⁹ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Siebenbürgisch-Sächsisch>.

²⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Bretonische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=cRjMeauabgU>.

²¹ Vd. <https://fr.wikipedia.org/wiki/Wallon>; lingvajn ekzemplojn vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=5VIy_HK-fLg.

²² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Gagauz_language.

²³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Karaim_language.

²⁴ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Judenspanisch>.

²⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Nordfriesische_Sprache.

²⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Provenzalische_Sprache.

²⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Provenzalische_Sprache.

²⁸ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=XIIaO3Hum7o>.

manksa,²⁹ *kurlanda* de la duoninsulo Neringio³⁰ kaj la *cakona* en Grekio.³¹ Oni do povas konstati, ke precipe preskaŭ ĉiuj lingvoj keltaj, retoromanĉaj en Svislando kaj Italio kaj multaj francaj, italaj kaj germanaj dialektoj kaj kelkaj romanaj kaj slavaj idiomoj estas koncernataj de la malapero. Tiujn lingvojn parolas nur ankoraŭ malmultaj homoj.³² En pluraj kazoj la lingvistoj disputas pri la demando, ĉu temas pri lingvo aŭ dialekto.

Al la supra listo oni eble devus aldoni ankaŭ la *rutenan* (Serbio,³³ Slovakio/Ukrainio³⁴), *belorusan* (Belorusio, vd. sube) kaj la *sameajn* lingvojn (vd. sube).

En **Korsiko** la malnova *korsa* lingvo estas grandparte forpuŝita de la franca lingvo. Malgraŭ tio, oni taksas, ke ekzistas ĉirkaŭ po cent mil parolantoj de la korsa lingvo kaj en Korsiko kaj Sardinio, entute eble ĝis 400 mil, se oni enkalkulas ankaŭ la homojn, kiuj parolas ĝin kiel duan lingvon.³⁵

Dum Korsiko estas parto de Francio, **Sardinio** apartenas al Italio. La 'indigena' *sarda* lingvo estas uzata de ĉirkaŭ 1-1,3 milionoj da homoj. Ĝi subgrupiĝas laŭ tri ĉefaj dialektoj: *logudora* en la nordo, *nuora* en la centro kaj *kampida* en la sudo. Nature, ĉiuj sardoj estas dulingvaj – italaj kaj sardaj. Ekzistas kelkaj lokaj 'bastionoj' de la sarda lingvo, dum la cetera parto estas italgita. Per loka leĝo de 1997 kaj itala leĝo de 1999 la sarda iĝis oficiale agnoskita kiel minoritata lingvo, kvan-kam la situacio ne estas komparebla kun la germana lingvo en Suda Tirolo aŭ la franca lingvo en la valo de Aosto. La erozio de la sarda lingvo tamen pli kaj pli progresas, precipe inter la junularo, ĉar multaj sardoj ne heredigis sian lingvon al la infanoj. Unesko klasifikis la sardan lingvon ekzist-minacata, ĉar multaj infanoj ne plu utiligas la lingvon en la lerneja aĝo, kvankam ili ja lernis ĝin. Multaj lingvistoj do kredas, ke la sarda estas elmortanta lingvo kaj ne plu ekzistos post 10-20 jaroj, kiam la generacio, kiu parolis la sardan, formortis, des pli ke ĉi tiu lingvo ne estas instruata en la lernejoj. Intertempe aperis stranga fenomeno: Anstataŭ la sarda la junularo aplikas iun italan dialekton (aŭ sociolekton), nomatan *italianu porcheddinu*, kiun la parolantoj de la sarda abomenas, ĉar ili konsideras ĝin malpura miksaĵo inter la itala kaj sarda.³⁶

Depende de la vidpunkto, la *sicilia* lingvo estas aŭ itala dialekto aŭ memstara lingvo. Ĝi estas parolata de ĉirkaŭ kvin milionoj da homoj en **Sicilio** kaj kelkaj aliaj sudaj regionoj de Italio. Aldoniĝas malfacile taksebla kvanto da migrantoj en la tuta mondo, tiel ke oni supozas, ke inter kvin kaj dek milionoj da parolantoj parolas la sicilian,³⁷ kiu tamen sufiĉe forte diferencas de la itala normlingvo.

Ne eblas trakti aŭ mencii ĉi tie ĉiujn **italajn dialektojn**, da kiuj probable ekzistas ĉirkaŭ mil.³⁸ En tiu serio de minoritataj lingvoj tamen nomindas la *emilia* dialekto, kiun eble parolas tri milionoj da homoj en **Padanio**, do en la provincoj de Piacenza, Parma, Reggio Emilia, Modena, Ferrara kaj en la urbo Bolonjo mem. La emilia lingvo estas kiel aliaj padaniaj idiomoj agnoskita de la Eŭropa Konsilio kiel minoritata lingvo kaj konsiderata de Unesko kiel protektinda lingvo. Por emfazi ĝian ekziston oni eĉ tradukis la Universalan Deklaracion de la Homaj Lingvoj al tiu idioma. Traduko de tiu teksto ekzistas ankaŭ en la *lombarda* idioma de norda Italio, kiu jam proksimas al la romanĉaj lingvoj.³⁹ Ankaŭ la *piemonta* apartenas al la norditalaj lingvoj aŭ dialektoj.⁴⁰

²⁹ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=EeiUb1z2DJk>.

³⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Kursenieki_language.

³¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tsakonian_language; La Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj en la manksa vd. sub https://www.learnmanx.com/featured_article_537771.html.

³² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_bedrohter_Sprachen#Europa.

³³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Pannonian_Rusyn.

³⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Carpathian_Ruthenia.

³⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Korsische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=fQhDy9O08Bg>.

³⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sardische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=D9Sipx-BA6I>. Vd. ankaŭ <https://fr.wikipedia.org/wiki/Gallurais> kaj <https://fr.wikipedia.org/wiki/Alguerois>.

³⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sizilianische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=HW7w4t7I2gU>.

³⁸ Vd. https://it.wikipedia.org/wiki/Lingue_parlate_in_Italia; <https://de.wikipedia.org/wiki/Norditalienisch>.

³⁹ Lingvajn ekzemplojn vd. https://www.youtube.com/watch?v=OaZdBs6n_H8.

⁴⁰ Vd. https://it.wikipedia.org/wiki/Lingua_piemontese.

La parolantoj de la *grizona retoromanĉa*, la kvara oficiala lingvo de Svislando, kiu diseriĝis en pluraj lokaj dialektoj, aktive luktas por sia konservado, ĉar post kelkaj jardekoj ĝi eble ne plu ekzistos.⁴¹ Surbaze de tiuj dialektoj estis kreita en 1982 la komuna skriblingvo *Rumanĉ Griŝun*, kiu ekde 2001 servas kiel oficiala lingvo en Grizono. Multaj presitaj materialoj de la kantono kaj federacio aperas en tiu komuna skriblingvo. Ankaŭ en la grizonaj gimnazioj oni instruas ĝin. Sed la lingvo Rumanĉ Griŝun estas kontestata inter romanĉlingvanoj mem. Multaj komunumaj lernejoj daŭre insistas instrui la lokan dialekton. La iama decido de la grizona parlamento eldoni la lernilojn por la retoromanĉaj lernejoj nur en Rumanĉ Griŝun parte rikoltis en la komunumoj akran kontraŭstaron, tiel ke pluraj lernejoj decidis daŭrigi la instruadon de la loka lingvo. Unu el la grizonaj registaranoj devis eĉ konfesi, ke la provo liberevole enkonduki la novan skriblingvon en la lernejojn fiaskis. Ankaŭ la belarta literaturo daŭre utiligas ĉefe la unuopajn idiomojn.⁴² Dum en Grizono la retoromanĉa estas parolata de ĉ. 60 mil homoj, oni taksas, ke entute ĉirkaŭ unu miliono da homoj en Svislando kaj Italio kune parolas la retoromanĉa(j)n lingvo(j)n,⁴³ se oni konsideras ankaŭ la lingvogrupojn en Suda Tirolo (30 mil)⁴⁴ kaj Friulio (600 mil).⁴⁵

La *frank-provenca* dialekto, kiu iam estis vaste uzata en Svislando, preskaŭ malaperis de la surfaco, ĉar la franca lingvo plene forpuŝis ĝin. Ĝi eble pluekzistis en restaĵoj en iuj regionoj aŭ vilaĝoj de la kantonoj Friburgo (Grujero) kaj Valezo (Evoleno). En Italio, la frankprovenca estas parolata en Piemonto kaj en la valo de Aosto. Kiel kuriozaĵo, en Francio en 2006 la populara Tintin-komikslibro estis tradukita al la frankprovenca lingvo, pli precize al iu ĝia dialekto, kiu estas parolata en la regiono de Bresse. Kune kun la idiomoj de *Languages d'oc* (Okcitanio) kaj de la *Languages d'oïl* (Ĵuraso) la frankprovenca formas la grupon de la *gaŭlromana* lingvaro.⁴⁶

Sub la premo de la kastilia lingvo en **Hispanio** estas diversaj idiomoj aŭ dialektoj kiel la *asturia*. Laŭdire parolas ĝin 450 mil homoj, kio signifas 44,4 procentojn de la tuta popolo de Asturio.⁴⁷ Ŝajnas, ke iom pli bonstata estas la *galicia* lingvo, kiu laŭdire estas parolata de ĉirkaŭ tri milionoj da homoj. Politike ĝi havas la statuson de minoritata lingvo en Hispanio. En la Galicia Aŭtonoma Provinco ĝi estas uzata ekde 1982 kiel normigita oficiala lingvo apud la hispana. La galicia lingvo estas tre proksima al la portugala lingvo, kun kiu ĝi iam formis unuecon.⁴⁸ Pro la ege malbona ekonomia situacio la hispana kamparo draste suferas je homa dezertiĝo. 90 procentoj de la hispanoj loĝas ĉirkaŭ Madrido kaj aliaj grandurboj ĉe la marbordo, miloj da malplenaj vilaĝoj estas vendeblaj,⁴⁹ kio probable havos ankaŭ lingvajn sekvojn.

Kiel por la retoromanĉoj en Grizono/Svislando, karakterize estas ankaŭ por la slavaj *soraboj* de **Luzacio (Germanio)**, kies lingvo dividiĝas laŭ du variantoj, ke ili parolas samtempe la germanan lingvon. Krom tio, ekzistas diversaj transiraj dialektoj. Kiel ĉiutaga lingvo la soraba estis konservata en pli alta grado en la pli kamparanaj katolikaj ol protestantaj regionoj. En **Saksio** vivas 40 mil kaj en **Brandenburgio** 20 mil soraboj. La aktuala nombro de parolantoj de la soraba(j) lingvo(j) estas tamen pli malalta. Kompare kun la *supra soraba*, kiun parolas ĉ. 13 mil homoj, la *malsupra soraba* kun ĉ. 7000 anoj estas serioze minacata de la elmortado post 20-30 jaroj. En la pasintaj jardekoj, ankoraŭ dum la tempo de GDR, la nombro de parolantoj konstante malkreskis surbaze de la industriigo, kolektivigo de la agrikul-turo, pro la germanigo kaj asimiliĝo de la soraboj kaj pro la alveno de homoj de ekstere. En la mezo de la 1960aj jaroj la antaŭe deviga instruado estis anstataŭigita per la libervola instruado, kiu sekvigis dras-tan reduktiĝon de la nombro de lernantoj. La soraba lingvo estas instruata en 25 bazaj kaj daŭrigaj ler-nejoj, estas eldonataj po du laikaj kaj religiaj gazetoj en la soraba lingvo, kaj monate aperas

⁴¹ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Bündnerromanisch>.

⁴² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Rumantsch_Grischun.

⁴³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Rätoromanische_Sprachen.

⁴⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ladinische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=6XOI31pidpc>.

⁴⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Friulian_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=WVTG4PXBDCI>;

⁴⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Galloromanische_Sprachen; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=2sCP38h1FFg>.

⁴⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Asturische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=mTls634PW7k>.

⁴⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Galicische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=ugUBT9-oY1o>.

⁴⁹ Vd. <https://orf.at/stories/3116984>, <https://www.businessinsider.de/ein-ganzes-dorf-fuer-85000-euro-in-spanien-werden-geisterstaedte-an-abenteuerlustige-verkauft-2019-3?IR=T>.

unu kultura revuo, du porinfanaj gazetoj kaj unu kleriga revuo. Du stacioj dissendas monatajn televidajn kaj tagajn radioprogramojn en la soraba lingvo. La strataj ŝildoj en la koncernaj regionoj, urboj kaj vilaĝoj estas dulingvaj. Kompreneble aperas ankaŭ libroj en la soraba lingvo; respondecaj por la aferoj de la sorabaj kulturo kaj lingvoj estas la Soraba Instituto en Budyšin/Bautzen kaj la Sorabistika Instituto de la lepsika universitato.⁵⁰

La dana minoritato en Germanio, la t.n. *danaj sudŝlesviganoj*, estas aŭtoktona etna grupo en la federacia lando **Ŝlesvig-Holstinio**, kiu ampleksas laŭ aktualaj indikoj ĉ. 50 mil komunumanojn. Laŭ alia fonto ĝia nombro eĉ superas 100 mil homojn, de kiuj 42 mil vivas en Ŝlesvigo, 37 mil en Holstinio kaj 25 mil en Hamburgo. Kiel ankaŭ la frisoj, soraboj kaj romaoj la danaj sudŝlesviganoj ĝuas la statuson de nacia minoritato laŭ la eŭropa *Kadra Konvencio pri la protektado de naciaj minoritatoj*, kiu estis ratifita de Germanio en 1997. Jam en 1955 la germana registaro devigis sin protekti la danan minoritaton en Germanio, dum la dana registaro faris la samon por la *germana minoritato en Danlando*. Kvankam la germanaj danoj kutime posedas la germanan ŝtatanecan, en Danlando oni diskutas pri la ebleco ricevi la danan civitanecan. Krom la danaj sudŝlesviganoj, en Ŝlesvig-Holstinio vivas ĉ. 6000 danaj ŝtatanoj, kiuj ne apartenas al la aŭtoktona dana popolgrupo, sed kiuj havas la saman statuson kiel aliaj negermanaj EU-civitanoj. La komunumoj de la aŭtoktona dana popolgrupo, kiu certe parolas la germanan lingvon, sed ne estis absorbita de ĝi, praktikas fortan kaj aktivan kulturan vivon kaj kunlaboras kun la frisoj, kiuj vivas ĉe la okcidenta bordo de la distrikto Norda Frislando.⁵¹

Malfacilas diri la veron kiom da homoj parolas la *feroan* lingvon; eble temas pri 60-100 mil parsonoj. La ekzakta nombro dependas de la scipovo de la lingvo fare de idoj de denaskuloj ekster la **Feroaj Insuloj**. La plimulto de tiuj homoj vivas en Danlando, precipe en ĝia ĉefurbo Kopenhago. Laŭ alia kalkulmodelo de la Nordatlantika Grupo en la dana parlamento, en 2007 oni determinis unuafoje la tutan nombron de la feroanoj de la unua generacio, t.e. kun feroa naskiĝloko kaj loĝloko en Danlando – estis trovitaj 7737 personoj. Tiu nombro estas kreskanta. Fine de 2013 vivis laŭ ŝtata dana statistiko entute 11'696 homoj (4877 viroj kaj 6819 virinoj) en Danlando, kies naskiĝloko troviĝas sur la Feroaj Insuloj. Pli novaj taksoj baziĝas sur 30 mil fero-lingvanoj vivantaj en Danlando. Tamen, neklare estas, kiom da ili ankoraŭ aktive parolas la originan lingvon. Sur la Feroaj Insuloj mem vivas ĉirkaŭ 51 mil homoj, de kiuj 45 mil estas konsiderataj kiel etnaj feroanoj. Post kiam en antaŭaj jarcentoj la feroa lingvo estis forpuŝita de la dana lingvo, hodiaŭ ambaŭ lingvoj kunekzistas kiel oficialaj lingvoj sur la insularo. La feroa, kiu pli proksimas al la islanda aŭ norvega ol al la dana lingvo, eĉ posedas la statuson de la ĉefa lingvo, dum la dana funkcias nur kiel formaloficiala lingvo, al kiu devas esti tradukitaj oficialaj feroaj leĝoj. Publikaj tabuloj kaj publikaj anoncoj ekzistas en la feroa lingvo. Anstataŭ la dana, la feroanoj preferas la anglan lingvon.⁵² Interesa lingvopolitiko!

En **Laponio**, kiu vaste etendiĝas de **Norvegio**, **Svedio**, **Finnlando** ĝis **Ruslando**, la *lapona* aŭ *samea* lingvo parte estas ekzist-minacata, sed havas grandan ŝancon pluviadi, ĉar en Skandinavio ĝi ĝuas oficialan statuson kiel minoritata lingvo kaj estas aktive uzata de la popolo, precipe junulara, en la radio kaj de kulturaj aktivuloj. La oficiala statuso de la samea lingvo tamen limiĝas al konkretaj urboj en tiuj landoj. Fakte ekzistas pluraj variantoj de la samea lingvo. En 2001 ekzistis dek konataj sameaj lingvoj, de kiuj ses fiksiĝis kiel skriblingvoj, dum la ceteraj estas apenaŭ plu uzataj. Ĉar la unuopaj sameaj idiomoj sufiĉe forte diferencas unu de la aliaj, oni decidis, ke la *nordsamea* funkciu kiel *lingua franca* inter la sameoj. En tiu ĉi lingvo la plimulto de la elsendoj en la radio kaj televido estas do disvastigataj. Dum la samea lingvo en la okcidento utiligas la latinan alfabeton, la *samea lingvo en Ruslando*, kiun praktikas ĉ. 500 homoj sur la duoninsulo Kola, estas skribata per cirilaj leteroj.⁵³ Rilate la lingvopolitikon en la koncernataj landoj, en la finna komunumo Inari estas agnoskitaj krom la nordsamea ankaŭ la *Inari-samea* kaj la *skoltsamea* idiomoj, kio kaŭzis, ke Inari kurioze fariĝis la sola oficiala kvinlingva komunumo de Finnlando. En Svedio la samea lingvo estis agnoskita en 2002 kiel unu el kvin

⁵⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sorbische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=5-kN53y1TWQ> kaj <https://www.youtube.com/watch?v=fay7UZCKzGk>.

⁵¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Dänische_Minderheit_in_Deutschland.

⁵² Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Färöer#Sprache>.

⁵³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kildinsamische_Sprache.

oficialaj minoritataj lingvoj de la lando. La norvega konstitucio donis lingvaj rajtojn al la sameoj jam en 1988.⁵⁴

Alia tre speciala kazo estas la **malta**, kiu funkcias kiel nacia lingvo de **Malto** kaj per tio kiel unu el la oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio (nome ekde la 1a de majo 2004). Kvankam Malto estis regata de fremdaj potencoj ĝis la ŝtata sendependiĝo en 1964, la maltanoj konservis sian propran idiomon, kiu estas heredanto de mezepoka nordafrika araba dialekto. Pli precize, ĝi estas proksima parenco de la elmortinta sicilia araba lingvo. En la malta lingvo troviĝas samtempe multaj influoj el la itala, hispana, franca kaj angla lingvoj. La malta lingvo estas unuflanke la sola aŭtoktona semida lingvo en Eŭropo kaj aliflanke la sola semida lingvo, kiu uzas la latinan alfabeton. Apartaj literoj por respeguli la specifajn sonojn en la malta lingvo estas la karakterizaj konsonantoj ĉ, ĝ, ž, gh, h. En la kazo de Malto oni do ne povas aserti, ke la angla aŭ itala forpuŝis la maltan lingvon, kvankam ili estas la duaj lingvoj de la maltanoj. En la malta lingvo okazas ankaŭ kunsidoj de la malta parlamento. Kaj kiu kredas, ke la malta lingvo estas elmortanta, tiu eraras. Male, en 2015 Malto havis 433'300 mil enloĝantojn, kiuj probable parolas aŭ scipovas tiun lingvon. Multaj maltanoj, kiuj vivas ekster la patrujo, same uzas sian originan lingvon.⁵⁵

Alia tiutipa nacia lingvo de tre malgranda plurlingva popolo estas la **luksemburga** (aŭ *lecebuer-ga*), kiu apartenas al la mozelfrankoniaj dialektoj de la germana lingvo, formas gravan parton de la luksemburga identeco kaj simbolas la politikan memstarecon de la ŝtato, kiu estas monarkio (granddukejo). Kvankam ĝi riskis esti forpuŝita de la franca kaj germana lingvoj, la luksemburga lingvo povis esti savita dank' al multflanka praktika uzado, parola kaj skriba, en la ĉiutaga vivo de la luksemburganoj, kiuj estas trilingvaj. Tutmonde ĉirkaŭ 300 mil homoj parolas la luksemburgan, de kiuj 250 mil loĝas en **Luksemburgio** mem. Inter lingvistoj kaj politikistoj ne regas ĝenerala konsento pri la demando, ĉu la luksemburga lingvo estas dialekto aŭ memstara lingvo. Unueca kaj deviga ortografio de la luksemburga lingvo estis enkondukita en 1976 per dekreto, kaj reformo de la ortografio okazis en 1999. Kiel atendeble ĉe germanaj lingvoj, ankaŭ la luksemburga havas plurajn lokajn dialektojn. La socilingvistika situacio de la luksemburga en Luksemburgio eble estas komparebla kun la socilingvistika situacio de la alemana lingvo en Svislando, kun la diferenco, ke la luksemburga disponas pri oficiala skriblingvo, kiu mankas al la svisalemana(j) dialekto(j).⁵⁶ Malgraŭ principe sama lingvo sur germana bazo, svisoj kaj luksemburganoj komprenas unu la aliajn nur malfacile.

Kvankam la **alemana** lingvo ŝajnas elmortadi en **Germanio**, **Aŭstrio** kaj **Francio** (la alsacan parolas takseble 600 mil homoj) pro la ĝenerala potenco de la „altgermana“ (kies svisa varianto uzas multajn „helvetismojn“, kiujn germanoj trovas strangaj⁵⁷), ĝi ludas fortan rolon en **Svislando**, kie ĝi estas aktive uzata de la nacia popolo en parola formo, kvankam iuj regionaj kaj lokaj dialektoj estas minactaj de la elmortado,⁵⁸ inter alie eble pro la influo de pli grandaj 'unuecaj' dialektoj (zurika, berna, orientsvisa) en radio kaj televido. Kurioza fenomeno estas, ke multaj eksterlandaj mi-grantoj adoptis la svisalemanan, kiu servas al ili kvazaŭ kiel *lingua franca* por rapide integriĝi en la svi-sa laborsocio. Dum ekzemple multaj, hungaroj, poloj, ĉeĥoj kaj slovakoj, kiuj siatempe forfuĝis de la komunismo en siaj landoj, preskaŭ perfekte integriĝis, fakte asimiliĝis en la svisa socio ankaŭ lingve, oni ne povas aserti tion pri multaj fremduloj el la islama, afrika, latinamerika kaj azia kulturspacoj. Ofte observeblas jena situacio: Dum la geavoj de tiuj enmigrintoj kutime ne scipovas la lokan lingvon kaj iliaj gepatroj scias ĝin pli malpli bone kaj ofte restas tre malkleraj, iliaj infanoj, kiuj aŭ naskiĝis en Svislando aŭ tie ĉi kreskis kaj vizitas la lernejojn, tamen kutime aŭtomate adoptas la lokan lingvon, kiu povas esti aŭ la germana skriblingvo aŭ ajna svisa dialekto. La parto de la dumiliona eksterlanda loĝantaro de Svislando

⁵⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Samische_Sprachen, <https://www.srf.ch/sendungen/rendez-vous/oeffentlicher-verkehr-soll-attraktiver-werden>, <https://www.youtube.com/watch?v=rd4sHz98VI8>; lingvajn ekzemplojn vd. <https://www.youtube.com/watch?v=sLQXQcipW-w>, https://www.youtube.com/watch?v=bovdT_Ca2vI kaj <https://www.youtube.com/watch?v=YK-pedM9PeM>.

⁵⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Maltese_language, <https://de.wikipedia.org/wiki/Malta#Sprache>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=-Z8owB639Xo>.

⁵⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Luxemburgische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=t_Kyw4Vwefs.

⁵⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_von_Helvetismen.

⁵⁸ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Schweizerdeutsch>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=DBqjgbOZSBs>.

estas ĉirkaŭ 25 procentoj⁵⁹ (2% estas rifuĝintoj). La generacio de tiuj enmigrintoj nomiĝas „secondos“ kaj reprezentas tute novtipan socian tavolon, kies lingvouzo estas ankoraŭ analizenda. Malgraŭ la eksterordinara etna kaj kultura diverseco de Svislando kaj kvankam ekzistas tendencoj de la formado de t.n. paralelaj socioj (kiuj restas limigitaj al familiaj grupoj), kio en aliaj landoj jam delonge povis esti kaŭzo por sociaj konfliktoj (kiel en Francio), la lingva paco dume povis esti konservata en Svislando.

Same kiel en Svislando, ankaŭ en *Lichtenštejno*, kie en la mezepoko oni ankoraŭ parolis la reto-romanĉan, la germana lingvo (Hochdeutsch) estas la oficiala lingvo, dum la loĝantaro de tiu eta princlando parolas lokajn dialektojn, kiuj estas tre similaj al la svisalemanaj idiomoj.⁶⁰

En centra kaj orienta Eŭropo aperis etnaj minoritatoj pro tirado de novaj, artefaritaj limoj meze tra etnaj regionoj, kie la anoj de tiuj minoritatoj klopodas konservi sian lingvon, ekzemple en Hungario, Rumanio kaj eksa Jugoslavio (madjaroj, germanoj).

En alia angulo de Eŭropo, en la albanaj lingvoteritorioj la tradiciaj dialektoj de la *toska* kaj *gega* variantoj de la *albana* lingvo riskas pli kaj pli fandiĝi kun la albana literatura normlingvo, kiu baziĝas sur la nordtoska dialekto de suda **Albanio**. La albanoj de **Kosovo**, kiuj parolas la nordorientan gegan varianton, postulas, ke tiu komuna normlingvo konsideru kaj adoptu ankaŭ elementojn de la lingvo praktikata en Kosovo. La albanoj konsideras sian lingvon heredanto de la antikva *iliria* lingvo, kiu estis parolata en okcidenta Balkanio, sed restis sen skribaj postlasaĵoj,⁶¹ tiel ke krom kelkaj rekonstruitaj vortoj oni ne konas tiun lingvon. Sed tiu teorio havas, pro manko de pruvoj, spekulativan karakteron. Pli verŝajne estas, ke la albana lingvo estas la posteulo de idiomo de longe izolita kaj nekonata hindeŭropa montara popolo en norda Albanio, kiu iom post iom migradis en la valojn kaj ebenaĵojn, kie ĝia lingvo disvastiĝis. Kun la fluo de la tempo la albana lingvo absorbis amason da romanaj, grekaj, slavaj kaj turkaj elementoj, kiuj estas bone rekoneblaj en la moderna lingvo, kiu fascinas la lingvistojn ĝis nun.⁶²

La nombroj de parolantoj de la *belorusa* lingvo ege varias kaj estas indikita inter 2,5 kaj 7,9 milionoj da homoj. La plimulto de parolantoj de tiu lingvo vivas en **Belorusio** (aŭ Blankrusio), kie ĝi servas kiel oficiala lingvo kune kun la rusa lingvo, kiu evidente dominas. Malgranda parto de belorusoj vivas en la regiono de Bjalistoko, kie ĝi praktike asimiliĝis kun la pola popolo. En Sovetunio ĝis la fino de la 1920aj jaroj, la belorusa lingvo prosperis, sed poste refalis sub la premon de la rusa lingvo, al kiu oni klopodis proksimigi ĝiajn alfabeton, gramatikon kaj leksikon. En la tempo de la perestrojko (1980aj jaroj) la belorusa lingvo estis revivigata kaj proklamita kiel ŝtata lingvo de Belorusio en januaro 1990. Sub prezidento Lukaŝenko la belorusa lingvo tamen estis denove forpuŝita de la rusa lingvo. Aktuale, la belorusa lingvo estas uzata precipe de malgrandaj intelektaj tavoloj en la urboj, krome sur la kamparo en formo de dialektoj. Ĝenerale, la belorusa lingvo do ludas nur dekoracian rolon. En 2003 la sola gimnazio kun belorusa instrulingvo estis fermita. La prognozaj por la belorusa lingvo estas sufiĉe malfavoraj, ĉar ĝi plej verŝajne malaperos kaj fandiĝos kun la rusa lingvo. Interese, ke post la anekso de Krimeo (en 2014) fare de Ruslando oni observas pli fortan atenton al la apogo de la belorusa lingvo, kio sekvigis samtempe certagradan alproksimiĝon de la ŝtataj gvidantoj al la opoziciaj intelektuloj, kiuj estas politike subpremataj de la reĝimo de Lukaŝenko.⁶³

Ruslando, kiu kutimas plej krude enmiksiĝi en la internajn aferojn de la iamaj sovetrespublikoj, reagas kun alergia kaj ĉagreno, se ĝi opinias, ke la rusa lingvo estas minacata en tiuj landoj. Rimarkinte, ke la rusa lingvo mankis sur iuj aŝioj de iu sporta aranĝo favore al la angla kaj belorusa lingvoj, la rusia kulturministro Vladimir Medinskij diris, ke tio estas „hontinda“ kaj konsideris tiun incidenton kiel „vojon al la lezado de unu el la ŝtataj lingvoj“ de Belorusio. Kaj li „petis“ la kulturajn respondeculojn de Belorusio sekurigi la pozicion de la rusa lingvo en tiu lando, pro kio la rusoj estus „tre dankemaj“. Kompreninte la minacon el Moskvo, la ‘respondecaj’ belorusaj kulturaj funkciuloj tuj humile certigis al Medinskij, ke la rusa lingvo ne estas minacata en Belorusio. Miĥail Babiĉ, la rusia ambasadoro en Belo-

⁵⁹ Vd. <https://www.watson.ch/schweiz/wissen/939899878-aus-diesen-3-laendern-wohnt-keine-einzige-person-in-der-schweiz>, <https://www.bfs.admin.ch/bfs/de/home/statistiken/bevoelkerung/migration-integration/auslaendische-bevoelkerung.html>, <https://de.statista.com/statistik/daten/studie/293759/umfrage/auslaenderanteil-in-der-schweiz-nach-kantonen>

⁶⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liechtensteinische_Mundarten.

⁶¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Illyrische_Sprache.

⁶² Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=d-DmhjyHSUg>.

⁶³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Weissrussische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=QSQrxJINxFk>; <http://eurobelarus.info/files/22/86/BdP.pdf>.

rusio, konstatis tendencojn de „belorusigo kaj malrusigo“ kaj la provon „falsi la historion“, se la „rajtoj de la rusa lingvo“ estas „lezataj“ en Belorusio.⁶⁴

Ekzistis aŭ ekzistas provo disvastigi la *okcidentpolesan* idiomon kiel interregionan mikrolingvon de Belorusio, Ukrainio kaj Pollando, kiu dume havas nur privatan signifon. Klopodoj en la 1990aj jaroj krei komunan interdialektan normlingvon por tiu idiomo havis malmultan sukceson.⁶⁵

Aliflanke, pli grandan uzatecon havas tre speciala idiomo, kiu estas nomata *Trasjanka*, kiu formas hibridan lingvon inter la rusa kaj belorusa. Trasjanka estiĝis, kiam nova generacio de rusoj venis en Belusion por transpreni ŝtatajn kaj partiajn funkciojn kaj oficojn en la publika administracio. La kamparana popolo estis devigata adapti sian lingvouzon al la rusa normlingvo, kio ofte malsukcesis. Do okazis, ke la infanoj de tiu parolgeneracio akiris tiun belorususan miksaĵon kiel unuan lingvon. La scienca debato pri tiu fenomeno tamen okazis nur en la unua duono de la 1990aj jaroj kaj unua sociolingvistika enketo estis efektivegita nur komence de la 2000aj jaroj en la ĉefurbo Minsk. Laŭ tia enketo inter 1200 personoj, kiuj estis demanditaj pri sia „gepatra lingvo“, 38 procentoj nomis Trasjanka, 49% la belorusan kaj 30% la rusan lingvon. Kiel „unuan lingvon“ 50% indikis la miksatitan lingvon, 42% la rusan kaj 18% la belorusan. Kaj kiel „ĉefe uzatan lingvon“ 55 % nomis la rusan, 41 % la miksatitan (Tras-janka) kaj nur 4 % la belorusan lingvon. Diference de la ĝenerala opinio, ke la miksatitan lingvon uzas nur malkleraj tavoloj, la enketo montris, ke ĝi estas uzata de ĉiuj tavoloj kaj aĝgrupoj, t.e. ĝi estas uzata de la granda plimulto apud la rusa lingvo. La uzado de la miksatita lingvo dependas de parolpartneroj, -loko, -situacio kaj -temo. Montriĝis, ke inter junaj belorusoj la parto, kiu utiligas la miksatitan lingvon, malkreskas favore al la rusa lingvo.⁶⁶

Pli favora estas la situacio de la *ukraina* lingvo, kiun parolas takseble 45 milionoj da homoj (en la mondo). En Ukrainio ĝi estas sola oficiala lingvo kaj tie estas parolata de 32 milionoj da homoj kiel gepatra lingvo. Laŭ regiona uzateco, la ukraina lingvo estas pli forte enradikiĝinta en okcidenta **Ukrainio** kompare kun la resto de la lando. Kvankam la ukraina lingvo estis subpremata, malpermesata, neglektata aŭ forpuŝata de la rusa lingvo dum la carisma kaj sovetia tempoj, ĝi mirinde ne pereis kaj en 1991 reviviĝis kiel oficiala lingvo de la sendependa ukraina ŝtato. En 2012 la rusa lingvo ricevis en 13 de 27 regionoj oficialan statuson. Do, la rusa lingvo daŭre ludas gravegan rolon en tiu lando, tiel ke oni devas paroli pri ukrain-rusa dulingveco en la ĉiutago de la ukraina popolo. En Ukrainio, la lingva demando restas do esence politika problemo, kiu kunkonsistigas la konflikton kun Ruslando, kiu postulas de Kievo doni garantion, ke la rusa lingvo aŭ la rajtoj de la ruslingvanoj estu pli forte respektataj.⁶⁷ Malgraŭ la ukrainigo de la lando, multaj civitanoj de Ukrainio malbone aŭ nesufiĉe parolas la ukrainan lingvon, kaj en orienta Ukrainio eĉ multaj etnaj ukrainoj parolas nur la rusan lingvon, ofte kun la prononco de la konsonanto g kiel h, alia lingva nuanco de Ukrainio.⁶⁸

En tiu pitoreska lingva pejzaĝo progresas (aŭ progresis) en Ukrainio, simile kiel Trasjanka en Belorusio, la hibrida lingvo nomata *Surĵik*. La estiĝo de tiu mikslingvo estas klarigebla per la preferado de la rusa lingvo en la sovetia tempo en Ukrainio, aliflanke per la migrado ene de tiama Ukraina SSR ĉefe de la okcidenta al la orienta landoparto. Surĵik estas esence fenomeno en la ruslingvaj teritorioj de Ukrainio, plej forte en centra oriento sur la linio Ĥarkov-Sumy-Poltava-Dnepropetrovsk (Dnipro)-Zaporoĝe, sed ankaŭ en centra kaj suda Ukrainio sur la linio Kievo-Ĥerson-Odeso. Provante paroli la rusan lingvon, la okcidentaj ukrainoj, kiuj migris al la industriaj urboj de orienta Ukrainio kaj parolis nur la ukrainan lingvon, produktis hibridan lingvaĵon, kiu esence konservis la ukrainajn sistemojn kaj gramatikon, sed aplikis rusan leksikon. Ankaŭ la inversa situacio estas observebla. En la sovetia tempo

⁶⁴ Vd. <https://naviny.by/article/20190412/1555071037-rossiya-prosit-belarus-zashchishchat-russkiy-yazyk>.

⁶⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Westpolessische_Sprache, https://en.wikipedia.org/wiki/West_Polesian_microlanguage.

⁶⁶ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Trasjanka>.

⁶⁷ Kiel reago al la publikigo de dekreto de Putin de la 24a de aprilo 2019, ke la Kremlo (aŭ la rusa registaro) planas havigi al la homoj en Donbaso (kaj poste ankaŭ al ĉiuj ukrainoj) rusajn pasportojn laŭ rapidigita proceduro, la 25an de aprilo 2019 la ukraina parlamento adoptis la novan leĝon n-ro 5670-d, kiu antaŭvidas la forigon de la ukraina lingvo kiel ŝtata lingvo en ĉiuj sferoj de la vivo en Ukrainio. La nova leĝo antaŭvidas samtempe altajn monopunojn por organizaĵoj, kiuj eldonas dokumentojn en la rusa anstataŭ ukraina lingvo. (Vd.

<https://www.aargauerzeitung.ch/ausland/putins-provokation-zum-amtsantritt-134395193>,

<https://www.currenttime.tv/a/rada-ukrainsky-language--zakon/29902634.html>,

https://www.gazeta.ru/politics/2019/04/25_a_12321535.shtml, <http://www.kremlin.ru/acts/news/60358>)

⁶⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ukrainische_Sprache.

la ekzisto de Surĵik estis tabuita kaj traktita de la lingvistiko kiel rara aperaĵo de la lingvokontakto. Post la sendependiĝo de Ukrainio Surĵik estis konsiderata kiel fenomeno, kiun oni devas eviti kaj kontraŭstari. En orienta Ukrainio la uzado de la klasika Surĵiko fakte komencis maloftiĝi, ĉar la ŝtato preferas puŝi la ukrainan lingvon. Aliflanke, en okcidenta Ukrainio estis observitaj kompareblaj kazoj de Surĵiko, precipe en la urba idiomo de Lvivo (aŭ Lvovo).⁶⁹

Kiel konate, Krimeo, kiu antaŭe apartenis al Ukrainio, estis ruze kaj krude rabita kaj trompe aneksita de Ruslando en 2014. Tie multe suferas la etna minoritato de la *krimeaj tataroj* pro tradicia subprema praktikado rusa, precipe kontraŭ la ĉefaj politikaj gvidantoj de tiu etno, kiu havas longan, gloran kaj tragikan historion.⁷⁰

Se paroli pri dialektoj ene de la slava lingvaro, observeblas jena interesa situacio: Dum ekzemple la granda *rusa* lingvo, kiu estas parolata en vasta *Ruslando* kaj ekster ĝi, ne konas klasikajn dialektojn, en *Slovenio* pro sia montara karaktero konserviĝis kelkdek dialektoj de la *slovena* lingvo, kiuj eĉ sufiĉe multe diferencas inter si, kvankam nur du milionoj da homoj parolas la slovenan lingvon.⁷¹

Inter polaj dialektoj, en 2011 ĉirkaŭ 509 mil homoj loĝantaj en **Supra Silezio (Pollando)** indikis la *slav-silezian* lingvon kiel gepatran lingvon.⁷²

La *kaŝuba* lingvo, kiu estas komprenata de ĉirkaŭ 300 mil kaj parolata de 108 mil personoj en la pola regiono de Gdańsk, havas ekde 2005 la statuson de regiona lingvo laŭ la *Eŭropa Ĉarto de la regionaj aŭ minoritataj lingvoj*.⁷³ Ĉar la kaŝuba lingvo nuntempe ne plu estas malhelpata de **Pollando**, ĝi estas instruata en kelkaj lernejoj, estis enkondukita en kelkajn komunumojn kiel oficiala lingvo kaj estas utiligata en diservoj. Malgraŭ ĉio ĉi, la kaŝuba estas ekzist-minacata lingvo. Por la plua ekzistado de la kaŝuba lingvo estos grava la demando, ĉu la komuna ortografio, pri kiu oni interkonsentis komence de la 1990aj jaroj, estos ĝenerale akceptita de la kaŝuboj mem.⁷⁴

En la baltaj landoj praktike ne plu uzata estas la *latgala* lingvo en orienta **Latvio**. Inter 1920 kaj 1934 la latgala estis oficiala kaj kleriga lingvo en **Latgalio**. Poste ĝi estis subpremata de la latva naciismo kaj neglektata de la sovetia reĝimo. Nuntempe tiu lingvo estas senstatusa. Tamen, ĝi estas protektata de la latvia lingvoleĝo, kiu difinas en § 3.4, ke la latvia ŝtato certigas la konservadon, protektadon kaj evoluadon de la latgala lingvo kiel historia varianto de la latva lingvo. La latgala estis forte ligata al la Biblio, kiu havas tradukon en tiu lingvo. Ekzistas ankaŭ ŝtate apogata komisiono por latgala ortografio. En la pasinteco oni vigle debatis ankaŭ en ĉi tiu kazo, ĉu la latgala lingvo estas memstara lingvo aŭ nura dialekto. Laŭ iuj fakuloj, la latgala lingvo plenumas ĉiujn kriteriojn de memstara lingvo ene de la familio de la baltaj lingvoj.⁷⁵

Dum la finnugra *liva* lingvo en **Latvio** estas konsiderata kiel elmortinta, la „folkloraj“ idiomoj de **Estonio** kiel *Seto* kaj *Võru*, kiuj apartenas al la sudestonaj dialektoj, travivas kuriozan renaskiĝon, ĉar la loka kaj estona popolo remalkovris la valoron de siaj tradicioj, volas eviti la pereon de sia maljuna kulturo kaj fieras pri la ekzisto de tiuj malgrandaj minoritatoj kaj ilia agnosko kiel specifa etna riĉeco de sia lando.⁷⁶ Sur la duoninsulo Noarootsi la vilaĝoj portas svedajn nomojn.

Dank' al la sendependiĝo de la koncernaj ŝtatoj en 1991 la lingvoj *estona*, *latva* kaj *litova* povis esti savitaj de la degenero, kiu minacis ilin sub la sovetia regado, kiu celis detrui la etnan identecon de

⁶⁹ VD. <https://de.wikipedia.org/wiki/Surschyk>, <https://en.wikipedia.org/wiki/Surzhyk>.

⁷⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Crimean_Tatar_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=OArDvI7HkK4>; http://www.planlingvoj.ch/Tataroj_de_Krimeo.pdf.

⁷¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Slowenische_Mundarten; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=ja6iY-h9ab0>.

⁷² Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Silesians#Language>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=PKW0fa4Y9m4>.

⁷³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/European_Charter_for_Regional_or_Minority_Languages.

⁷⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Kashubian_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=PVg68TjQ3k4>.

⁷⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Lettgallische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=QR6HMLipuu0>.

⁷⁶ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Setos>, <https://en.wikipedia.org/wiki/Setomaa>, https://en.wikipedia.org/wiki/Võru_County#Setos, https://www.youtube.com/watch?v=k-5Lz_p5Ey4.

tiuj kaj multaj aliaj popoloj pro ideologiaj kaj politikaj kaŭzoj.⁷⁷ Ĉiujn kvin jarojn en la baltaj landoj okazas la mondfamaj kant- kaj dancfestoj, kiuj estas impresaj atestoj de la konservado de la muzika kulturo de tiuj landoj.⁷⁸

Fine pri **Ruslando**, kie estas praktike elmortantaj dekoj da indiĝenaj lingvoj, kiuj estis forpuŝitaj de la rusigo, sovetiigo kaj modernigo de la socio en la pasinteco. Inter la plej grave ekzist-minacataj lingvoj troviĝas tiaj de la nordo kaj oriento kiel la *keta*,⁷⁹ *evena*,⁸⁰ *evenka*,⁸¹ *itelmena*,⁸² *nivĥa*⁸³ kaj *ulĥa*. Iom pli bona estas la situacio de la lingvo de la *ĉukĉoj*.⁸⁴ Certe ankaŭ aliaj minoritataj lingvoj de Ruslando estas en mizera stato, ĉar la geno- kaj etnocidaj tendencoj de la rusa politiko, kiun karakterizis longdaŭra praktikado de naciismo kaj ŝovinismo, paranoja revenĝismo kaj fanatika ideologio, plene plenumis sian laboron dum la pasintaj jardekoj kaj jarcentoj, eĉ se por kelkaj lingvoj de Sovetunio estis kreitaj propraj alfabetoj, ne nur kun lingvistikaj intencoj. Lige kun tiu praktiko ekzistas tre konsiderindaj ekzemploj kaj pruvoj. En multaj lokoj de **Siberio** la infanoj de etnaj minoritatoj estis devigitaj viziti internulejojn, kie ili devis lerni la rusan kaj nei sian propran lingvon. Tiel estas klarigebla ekzemple la rapida malfortiĝo de la *aleuta* lingvo, kiu estis uzata en Sovetunio ĝis la 80aj jaroj. En la jaro 2007 oni registris la plej lastajn 150 parolantojn de tiu lingvo, pro kio ĝi estas konsiderata kiel forte aŭ severe ekzist-minacata lingvo.⁸⁵ Precipe la malgrandaj lingvoj kaj etnaj komunumoj de la nordaj indiĝenoj travivas grandan krizon; tie la homoj suferas pro alkoholismo kaj senlaboreco, frua morto kaj ĝenerala socia dezertiĝo, certe ankaŭ pro klimataj kialoj.

Minacataj estas ankaŭ la ekzisto de tuta vico de finnugraj lingvoj en Ruslando kiel la *votjaka* (en Ingermanlando),⁸⁶ same la lingvoj de la popoloj *Ĥanti*,⁸⁷ *Mansi*,⁸⁸ *Komi*,⁸⁹ *Mari* (aŭ *ĉeremisoj*),⁹⁰ krome la *udmurta*⁹¹ kaj *mordva*.⁹² La *ĉuvaŝa*⁹³ kaj *jakuta*,⁹⁴ kiuj apartenas al la tjurka lingvaro, kaj la *kalmuka*, kiu estas mongolida idiomo,⁹⁵ montras similajn krizajn simptomojn kaj degenerajn tendencojn. De la 7.261 *dolĝanoj* (censo de 2002), de kiuj 5517 vivis en la Taimyra Aŭtonoma Cirklo, granda parto parolas krom la propra lingvo la jakutan kiel duan lingvon, kiu estas konsiderata iel ĝemela idiomo.⁹⁶

La finnugrajn kaj tjurkajn lingvojn karakterizas iliaj altevoluintaj aglutinaj trajtoj kaj la riĉa kaza sistemo. Dum la finna lingvo havas 15 kaj la estona 14 kazojn,⁹⁷ la turka lingvo havas nur 6 kazojn⁹⁸ kaj la mongola lingvo havas 7 aŭ 8 kazojn.⁹⁹ Pro siaj pli kurta leksika konsisteco, facila prononco kaj amaso

⁷⁷ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=KW55VwRrRIY>, <https://www.youtube.com/watch?v=PFTAI0ux3Bs>, <https://www.youtube.com/watch?v=j8XSzmsAm9k>.

⁷⁸ Vd. <https://2019.laulupidu.ee>.

⁷⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ket_language.

⁸⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Even_language.

⁸¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Evenki_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=XEMCLKe-VPk>.

⁸² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Itelmen_language.

⁸³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Nivkh_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=qU6pYyqz-IU>.

⁸⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Chukchi_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=KLndQe87ufc>.

⁸⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Aleut_language.

⁸⁶ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Votic_language.

⁸⁷ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=RburLpxOGMw>.

⁸⁸ Lingvajn ekzemplojn vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=zLjMQP_5i60.

⁸⁹ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=0c5oosg6Bs4>.

⁹⁰ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=TDeJyve1Cco>.

⁹¹ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=ggl5f1DDqus>.

⁹² Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=HxatxNAkWEQ>. La nomojn de la finnugraj lingvoj en la angla lingvo vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Finno-Ugric_languages.

⁹³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Chuvash_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=SdBcD5HMpt0>.

⁹⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Yakut_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=d2fyPcoKGzo>.

⁹⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Kalmyk_Oirat; lingvajn ekzemplojn vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=mDe_tx3FUTw.

⁹⁶ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Dolgans>.

⁹⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Finnische_Sprache#Kasus, https://de.wikipedia.org/wiki/Estnische_Sprache#Substantive.

⁹⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Türkische_Sprache#Fälle.

⁹⁹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Mongolische_Sprache#Kasus.

de germandevenaj vortoj la estona lingvo estas konsiderata kiel plej facile lernebla finnugra lingvo, almenaŭ por germanlingvanoj.

En la 1980aj jaroj Lennart Meri, la iama memorinda prezidento de Estonio, ankoraŭ povis filme dokumenti la vivon de la plej lastaj reprezentantoj de tiuj indiĝenaj popoloj de centra, orienta kaj norda Ruslando. Novaj kompaktdiskoj estis produktitaj antaŭnelonge kaj aĉeteblaj en Estonio, ekzemple en la Nacia Historia Muzeo en Tartu, kie oni povas viziti interesan ekspozicion pri la finnugraj popoloj kaj lingvoj.¹⁰⁰

La *karela* lingvo estas parolata de proksimume 30 mil homoj (censo 2010) en Ruslando, ĉefe en la **Karela Respubliko (Kareljo)** kaj en la regiono Tver. La disdivido de la karela lingvo laŭ diversaj dialektoj malhelpis ĝis hodiaŭ la kreon de unueca karela skriblingvo. Lingvistike, la karela distingas sin de la finna lingvo precipe per la palatala kaj frikativa karaktero de siaj sonoj kaj per la uzado de multaj vortoj pruntitaj el la rusa lingvo. En la Karela Respubliko la karela havas la statuson de minoritata lingvo, kaj de post la malfruaj 1990aj jaroj ekzistas streboj samrangigi la karelan kun la rusa lingvo. En la regiono de **Tver** la kareloj disponas pri nacia kaj kultura aŭtonomeco, kiu garantias la utiligon de la karela lingvo en la lernejoj kaj gazetaro. En Finnlando la karela lingvo havas, kadre de la *Eŭropa Ĉarto de la regionaj aŭ minoritataj lingvoj*, la oficialan statuson de nacia minoritata lingvo. En 2008 estis kreita en la universitato de Joensuu la unua karela lingvokatedro de Finnlando.¹⁰¹

Unika estas la lingva pejzaĝo de la **Kaukazo**, nomata ankaŭ „Montaro de la lingvoj“, kie ekzistas kvardeko da diversaj lingvoj kun centoj da dialektoj,¹⁰² inter kiuj kelkaj ankaŭ estas grave minacataj de la pereado kiel la *svana*,¹⁰³ *cova-tuŝa* (aŭ *batsa/baca*¹⁰⁴), *uda*¹⁰⁵ kaj *laza*¹⁰⁶ en **Kartvelio** aŭ kiel la *hunsiba*¹⁰⁷ en **Dagestano**. Praktike la ekzistado de ĉiuj malgrandaj lingvoj de norda Kaukazo – precipe *karaĉaja* kaj *balkara*,¹⁰⁸ *ĉerkesa*,¹⁰⁹ *kabarda*,¹¹⁰ *adigea*,¹¹¹ *oseta*¹¹² kaj *inguŝa*¹¹³ – estas minacata kaj limiĝas precipe al la folkloro (kaj politika propagando).¹¹⁴ Pro la naciisma politiko de Ramzan Kadyrov en **Ĉeĉenio**, kiu aktive flegas la ĉeĉenan kulturon, la situacio de la *ĉeĉena* lingvo estas iomete pli favora, ĉar almenaŭ oni ne subpremas aŭ neglektas ĝin. La ĉeĉena lingvo posedas ege riĉan vokalan kaj konsonantan sistemon kaj ĝia gramatiko disponas pri ses nominalaj klasoj kaj 13 kazoj.¹¹⁵ La *ubiĥa* lingvo elmortis en 1992 post kiam la plej lasta parolanto de tiu lingvo forpasis en tiu jaro.¹¹⁶

* * *

Sukcesaj – kaj rigarde al ilia ekonomia evoluo kaj vide al la konservado de la gepatra lingvo – estas ofte tiuj etnaj minoritatoj, ĉe kiuj la homoj kreskas dulingve. Sed ankaŭ multaj de tiuj komunumoj konas

¹⁰⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Estnisches_Nationalmuseum.

¹⁰¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Karelian_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=sW12jFqijH0>; vd. ankaŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Livvi-Karelian_language kaj https://olo.wikipedia.org/wiki/Karjalan_kieli.

¹⁰² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kaukasische_Sprachen.

¹⁰³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Svan_language.

¹⁰⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Bats_language.

¹⁰⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Udi_language; <https://www.stern.de/panorama/wissen/natur/bedrohte-sprachen-die-sprachensammler-3066486.html>.

¹⁰⁶ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Laz_language.

¹⁰⁷ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tsezic_languages.

¹⁰⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Karachay-Balkar_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=-wK4bvAgKV4>.

¹⁰⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Circassian_languages.

¹¹⁰ Lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=tOrycYykmlU>.

¹¹¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Adyghe_language.

¹¹² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ossetian_language.

¹¹³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ingush_language.

¹¹⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Nordwestkaukasische_Sprachen; muzikajn ekzemplojn vd. sub

<https://www.youtube.com/watch?v=PXDQFBmg1GI>, <https://www.youtube.com/watch?v=AZ0iu1oUbDo>.

¹¹⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Chechen_language, https://en.wikipedia.org/wiki/Noun_class#Caucasian_languages; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=5IJKxDR88>

¹¹⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ubychische_Sprache.

longan historion de diskriminado kaj malrespektado de la propra ekzisto fare de la ŝovinismaj naciŝtatoj, kies vico estas senlima. Kiel alternativo al la naciŝtato, la koncepto „Eŭropo de la regionoj“ povus ludi pozitivan kontribuon al la konservado de tiuj popoloj kaj ties lingvoj, kiel montras ekzemple la aŭtonomiaj reguligoj de Suda Tirolo, kiu longe suferis pro la italia politiko,¹¹⁷ kaj aliaj regionoj de Eŭropa Unio cele al la konservado de la kultura diverseco sur tiu etne ege heterogena kontinento. Per sia *Ĉarto pri regionaj aŭ minoritataj lingvoj* la Unio kreis utilan instrumenton por protekti tiujn lingvojn. Pere de la organizaĵo EBLUL (Eŭropa Oficejo por Malpli Uzataj Lingvoj) la evoluo de la situacio de tiuj lingvoj estas observata ekzakte kaj kritike. Bedaŭrinde, la apogo de specifaj programoj, kiuj celas evoluigi la lingvan diversecon, ofte dependas de personaj, individuaj kaj materiaj rimedoj, kiuj estas mankantaj (dum oni elspezas miliardojn por armado...). Kelkaj iniciatoj havas la celon dokumenti konkretan lingvon, kiel ekzemple la eldonado de vortaroj. En 1994 Knut Bergsland publikigis kompletan vortaron de la aleuta lingvo, kaj en 2005 aperis en Hamburgo enkonduka lernolibro de la *eskim-aleuta* lingvo.¹¹⁸ Sed tiaj laŭdindaj projektoj ofte ne sufiĉas por sekurigi la pluekzistadon de minacata lingvo kaj ne kontentigas la parolantojn de la koncerna lingvokomunumo mem, kiuj deziras pli efikajn kaj modernajn lernprogramojn por siaj lingvoj ol nuraj akademias klopodoj.

* * *

En la sekva parto ni esploru ankoraŭ kelkajn aliajn interesajn kazojn de minacataj lingvoj laŭ kontinentoj, kiuj m estas konataj, parte nekonataj, por vidi kiu estas la aktuala situacio de tiuj lingvoj kaj kio estas entreprenata por savi mort-minacatajn indiĝenajn idiomojn.

Afriko

En Afriko ekzistas pli ol 2000 etnaj grupoj. Preskaŭ triono de la konataj lingvoj uzatas sur la nigra kontinento. Pli ol 350 lingvoj estas konsiderataj kiel minacataj en Afriko. Pro milito, fuĝado, limigo de paŝtejoj kaj manko de akvo en multaj landoj de Afriko la ekzistado de sennombraj malgrandaj popoloj kaj kun ili ties lingvoj estas draste minacataj. En la delto de la Niĝer-rivero kaj en la nordoriento de **Niĝerio** (en ĉi tiu lando vivas pli ol 250 diversaj etnoj kun pli ol 500 lingvoj¹¹⁹) la lingvoj de diversaj indiĝenaj popoloj estas minacataj, se kelkaj ne jam elmortis. Pro la katastrofaj vivkondiĉoj multaj indiĝenoj rezignas pri sia tradicia vivo kaj formigras de la kamparo al la grandurboj. En sia nova ĉirkaŭaĵo ili ankaŭ rezignas pri sia tradicia lingvo, ĉar ili kulture asimiliĝas kaj ofte perdas sian originan identecon.

Alia problemo estas, ke en Afriko ŝtataj limoj ne kongruas kun la limoj de lingvoj kaj etnaj grupoj. Krom kelkaj esceptoj ne formiĝis unuecaj kulturnacioj, tiel ke ligo inter lingvo, popolo kaj ŝtato ne ekzistas. La socilingvistika situacio en nigra Afriko estas grandparte karakterizata de trilingveco. Apud la sennombraj indiĝenaj lingvoj de la unuopaj popolgrupoj pro diversaj kaŭzoj (migrado kaj komerco, antaŭkoloniisma regnoformado, religia misiado k.a.) certaj lingvoj elformiĝis kiel „afrikaj trafik-lingvoj“, kiuj transprenis la taskon garantii la interkompreniĝon de la anoj de la diversaj popolgrupoj. Ili ludas gravan rolon precipe en la afrikaj urboj, kies loĝantaro ne plu estas karakterizata unuavice de la aparteneco al konkreta etna grupo. Tiuj trafiklingvoj estas uzataj ankaŭ en la kleriga sistemo, en la amaskomunikiloj kaj literaturo. Al tiuj lingvoj apartenas ĉefe la *svahila* en **orienta Afriko**, *Hausa*, *Fulfulde*, *Kanuri*, *Igbo*, *Yoruba*, sed ankaŭ *Bambara*, *Dioula* kaj *Malinke* en **okcidenta Afriko**. En **Centra Afriko** la analogan rolon ludas *Lingala*, *Kikongo* kaj *Sango*. En la koloniisma tempo estis enkondukitaj la lingvoj **franca**, **angla** kaj **portugala**. En la plimulto de la nigrafrikaj ŝtatoj tiuj lingvoj estas uzataj kiel oficialaj lingvoj, kiel lingvoj de la juĝejoj, lernejoj kaj scienco en la universitatoj kaj altlernejoj. La scipovo de la eŭropaj lingvoj forte dependas de la lando, grado de kleriĝo kaj urbiĝo. Esceptojn de la trilingveco formas precipe **Burundio**, **Ruando**, **Kenjo**, **Ugando** kaj **Tanzanio**, kie ĉefe la *svahila* lingvo estas subtenata kaj ankrita kiel oficiala lingvo.

Tute alia situacio prezentiĝas en **norda Afriko**, kie la indiĝenaj lingvoj (kiel la berberaj en la nordo) estis forpuŝitaj de la araba lingvo. Por la plimulto de nordafrikanoj la *araba* fariĝis sola gepatra lingvo; la franca estis anstataŭigita per la araba kiel oficiala lingvo. En **Etiopio**, kie la *amhara* lingvo

¹¹⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Autonomie_Südtirols.

¹¹⁸ Vd. <https://www.youtube.com/watch?v=zUXDAbzwip8>.

¹¹⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Nigeria#Ethnic_groups kaj <https://en.wikipedia.org/wiki/Nigeria#Languages>.

funkcias kiel trafiklingvo, koloniisma lingvo ne enradikiĝis. En **Somalia** la kuŝida *somalia* lingvo superas, dum la itala lingvo perdis sian signifon.¹²⁰

Aparte malfacila estas la situacio de la berberaj lingvoj en norda Afriko, kiuj estis subpremataj dum longa tempo de la arabaj registaroj de Alĝerio, Libio kaj Maroko.

La ĉefa indiĝena grupo de **Alĝerio** estas la *berberoj* (propra nomo: *maziroj*), kiuj vivas oriente de la ĉefurbo en **Kabilio**. Organizaĵoj, kiuj luktas por la rajtoj de tiuj popoloj, estas malhelpataj de la alĝeriaj instancoj, kaj protestoj kontraŭ la lingva politiko estas sufokataj de la alĝeria polico. En 1980 la alĝeria reĝimo de Chadli Bendjedid (1979-92) disbatis la „berberan printempon“, dekoj da maziraj aktivuloj estis arestitaj kaj malliberigitaj por longa tempo. En 2001 en Alĝerio amaso da berberoj protestis kontraŭ la arabigo; pereis 126 maziraj manifestaciintoj, kiuj kontraŭstaris la lingvopolitikon de la reĝimo de Abd al-Aziz Bouteflika (1999-2019), sed la kulpuloj neniam estis prezentitaj antaŭ la tribunalo. Kvankam en aprilo 2002 la lingvo de la kabiliaj berberoj (nomata *Taqbaylit*) kun ties unika skribo (*Tifinagh*)¹²¹ estis agnoskita de Alĝerio kiel „nacia lingvo“, la registaro en Alĝerio rifuzis enkonduki la berberan kiel oficialan lingvon. En aŭgusto 2009 la alĝeriaj aŭtoritatoj arestis la prezidanton de la „Monda kongreso de la maziroj“ kaj ok aliajn berberajn aktivulojn. Ankaŭ postaj protestoj de la maziroj estis sange disbatitaj de la alĝeria polico. La postulo pri aŭtonomeco de Kabilio estas strikte rifuzata de la alĝeria registaro kaj kondamnita kiel separatismo. La maziroj konsideras sin viktimo de unika genocido en sia lando.¹²² En decembro 2017 200 mil maziroj denove protestis favore al pli multaj lingvaj rajtoj. Sed en pluraj urboj la protestoj estis perforte disbatitaj de alĝeriaj sekurecaj fortoj. La protestoj eksplodis, ĉar la alĝeria parlamento rifuzis proponon pli forte subteni la lingvon kaj kulturon de la berberoj en Alĝerio.¹²³

Ankaŭ en **Libio** sub la diktatoro Muammar Gaddafi la *berberoj* (*imazigh*-oj), kiuj tie formas la plej grandan indiĝenan plimulton, estis malbone traktataj. Kadre de la t.n. kulturevolucio de 1973 iliaj tradicioj kaj lingvo (*tamazight*) estis malpermesitaj kaj la libiaj berberoj estis klasifikitaj kiel araboj. Gaddafi timis la berberan separatisman danĝeron, kiu povus malhelpi liajn potencon kaj planon proklami Libion araba ŝtato. La berberoj de Libio vivas dise tra la tuta lando, precipe en la nordokcidento, kie la urbo Zuvara estas konsiderata kiel ilia neoficiala ĉefurbo. Komence la berberoj ĝojis pri la falo de Gaddafi, sed tiu kontento ne daŭris tro longe, ĉar baldaŭ la situacio de la berberoj denove malboniĝis. La nova parlamento, kiu kreis novan konstitucion (2013) pretas cedi al la berberoj nur 2 de entute 60 sidlokoj, kvankam la imazigh-berberoj formas 10 ĝis 15 procentojn de la popolo de Libio, kiu havas ses milionojn da loĝantoj. La berberoj estis ofendataj, rifuzis partopreni en la parlamentaj kunsidoj kaj postulis justecon. Khairi Hamisi, altranga reprezentanto de la imazigh-oj, postulas, ke la libiaj berberoj ricevu la samajn kulturajn kaj lingvajn rajtojn kiel la araboj kaj ke tiu principo devus esti fiksita en la konstitucio. Laŭ tio, la lingvo *tamazight* devus aperi sur la pasportoj, moneroj kaj bankbiletoj de la lando.¹²⁴

En **Maroko** la situacio de la berberoj eble estas iom pli favora, kvankam daŭre malkontentiga. Reĝo Mohamedo VIa konfesis en oktobro 2001 la berberan (maziran) identecon de Maroko kaj anoncis, ke li volas apogi la lingvon de tiu popolo kaj permesi ĝian instruadon en la lernejoj. Laŭ ordono de la sama reĝo, en januaro 2002 estis fondita la „Reĝa Instituto por la mazira kulturo“.¹²⁵ Sed ĝi havas neniujn decidajn kompetencojn kaj estas (mis)uzata de la ŝtato kiel propaganda reklamilo por la laŭdira bona volo de la reĝo. Post multjara postulado, ke la mazira lingvo estu reprezentata ankaŭ en la amas-komunikiloj, en marto 2010 la publika televida stacio „Tamazight“ komencis disvastigi elsendojn en la

¹²⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Afrikanische_Sprachen, <https://en.wikipedia.org/wiki/Somalia#Languages>.

¹²¹ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Berbers>, https://en.wikipedia.org/wiki/Berber_languages, https://en.wikipedia.org/wiki/Kabyle_people, <https://en.wikipedia.org/wiki/Algeria#Languages>, https://en.wikipedia.org/wiki/Languages_of_Algeria; <https://en.wikipedia.org/wiki/Tifinagh>; <http://www.gfbv.it/2c-stampa/2010/100416de.html>.

¹²² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Berber_languages; https://en.wikipedia.org/wiki/Kabyle_language; <http://www.algerien-story.de/kultur/frames/v%F6lker.htm>; <https://www.gfbv.de/en/news/algeria-recognition-of-the-berber-language-7851>; <https://www.gfbv.de/de/news/anhaltende-proteste-von-masiren-in-algerien-und-marokko-8937>.

¹²³ Vd. <https://www.gfbv.de/de/news/anhaltende-proteste-von-masiren-in-algerien-und-marokko-8937>.

¹²⁴ Vd. <https://www.mena-watch.com/libyens-berber-fordern-gleichberechtigung>;

https://en.wikipedia.org/wiki/Demographics_of_Libya#Ethnic_groups.

¹²⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Royal_Institute_of_the_Amazigh_Culture.

tri maziraj idiomoj *Tamazight*, *Tarifit* kaj *Tachelhit*.¹²⁶ Por eksteraj observantoj ne estas facile travidi la realan situacion. Dum longa tempo la berbera lingvo ne povis esti aplikata en la publikaj servoj, marokanoj ne rajtis doni mazirajn nomojn al siaj naskitaj infanoj kaj publikaj tabuloj en la mazira estis forigitaj. Manifestacioj, kiuj postulas pli da rajtoj por la berberoj, estis regula sufokataj de la maroka polico kaj homrajtaj aktivuloj estas ĉikanataj kaj jure persekutataj. La 17an de junio 2011 reĝo Mohamedo VIa anoncis, ke la lingvo *Tamazight* iĝis oficiala lingvo de Maroko kaj estos uzata en la administracio. Tiel longe ke Maroko ne estas demokratia jura ŝtato, la berberaj lingvoj spertos malavantaĝojn.¹²⁷ En oktobro 2017 ekflamis novaj protestoj de maziroj en la Rif-montaro, kie la aktivuloj de la Hirak-movado postulis la finon de la korupto kaj misuzo de la politika potenco kaj pli da atento al sia neglektata regiono. Anstataŭ serioze okupiĝi pri la problemoj de la berberoj, la marokaj aŭtoritatoj kutimas eviti manifestaciojn kaj aresti aktivulojn de la Hirak-movado, kiujn ili preferas malliberigi por multaj jaroj.¹²⁸

En meza **Tunizio** ekzistas ankoraŭ proksimume 500 domoj, en kiuj vivas berberoj. Pro formigrado ilia nombro pli kaj pli malpliĝas, kvankam la registaro klopodas bremsi tiun tendencon per kolektado de mono, ĉar oni volas konservi tiujn loĝejojn, kiuj reprezentas unikan tradicion arkitekuran kulturon, kiu estas minacata de la disfalo, ĉefe por allogi turistojn.¹²⁹

En la **Niĝera Respubliko** kaj **Malio** lokaj berberaj idiomoj estas agnoskitaj kiel oficialaj lingvoj. Kiel literaturaj lingvoj ili tamen trovas nur limigitan aplikon.

Aparta grupo de la berberoj estas la *tuaregoj*, kiuj vivas ĉefe en la Sahara dezerto kaj Sahela zono, kie ili uzas diversajn proprajn lingvojn kiel *Songhai* kaj *Hassania*, sed ankaŭ la araban kaj francan lingvojn. Ilia nombro varias inter 1,5 kaj 3 milionoj da anoj. En la pasinteco ree ekflamis ribeloj flanke de la tuaregoj, kiuj sentas sin malhelpataj praktiki sian nomadan vivmanieron en la koncernaj ŝtatoj, kie ili loĝas.¹³⁰

Tre speciala kazo en norda Afriko estas la *kopta* lingvo, kiu respregulas staton de la antikva egipta lingvo. La kopta estas ĉefe uzata kiel liturgia lingvo de la diservo de koptaj kristanoj en **Egiptio**. Kvankam ili ĉefe parolas la araban, en la pasintaj jardekoj la kopta modiĝis precipe inter junaj koptoj kiel vivanta lingvo, ĉar per ĝi ili emfazas sian specifan identecon ene de la egiptia socio.¹³¹

Alia fama indiĝena kulturo de Afriko, la *San*-popolo, nomata ankaŭ „*buŝmanoj*“, estas konsiderata kiel unu el la plej maljunaj popoloj de la mondo entute. La radikoj de tiu popolo estas ĝis 25 mil jarojn aĝaj. Ĝi vivas en la ŝtatoj de **Sudafriko**, **Bocvana**, **Namibio** kaj **Angolo**, iam vivis kiel ĉasistoj kaj kolektistoj kaj migradis kiel nomadoj tra la lando. Dum miloj da jaroj la San-popolo kolektis enorman fakan scion pri plantoj, bestoj kaj naturaj fenomenoj. Kiam antaŭ ĉirkaŭ 600 jaroj bantuaj grupoj el la norda direkto penetris en la landon de la buŝmanoj, ili estis forpuŝitaj kaj devis foriri al la Kalaharia de-zerto, kie ili adaptiĝis al la novaj vivkondiĉoj, kiuj tie estas tre malfacilaj. En la 17a jarcento sekvis la eŭropanoj kun ties trudaj regado- kaj posedo-ambicioj. La lando de la buŝmanoj estis disdividita laŭ diversaj naciŝtatoj, grandaj farmbienoj kaj loĝzonoj estis konstruitaj, la praloĝantoj, kiujn la blankuloj konsideris primitivaj kaj minoraj, estis forpelitaj, mortigitaj aŭ sklavigitaj, ĉar oni malkovris tertrezorojn, tiel ke ili troviĝas en mizeraj loĝzonoj aŭ rezervejoj. Nuntempe ekzistas ĉirkaŭ 100 mil anoj de la San-popolo en suda Afriko. La plimulto laboras kiel dungitoj en farmbienoj. Ili estas malriĉaj, ofte ne scipovas legi nek skribi kaj ne havas politikajn rajtojn. Per tio la kulturo de tiu popolo pli kaj pli perdiĝas, same ĝiaj unikaj scioj kaj idiomoj, kiuj apartenas al la grupo de la 20-30 Koisano-lingvoj.¹³² Karakterizaj por tiuj lingvoj estas iliaj klaksonoj, pri kiuj la sciencistoj diskutas, ĉu eble temas pri restaĵo de la homa pralingvo. Nur du lingvoj de tiu grupo estas konservataj, nome */Gui* kaj *Taa* aŭ *!Xóǀ*, kiu estas parolata de ĉirkaŭ 4 mil San-oj en Bocvano. Tiu lingvo elstaras pro sia giganta foneminventaro,

¹²⁶ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Standard_Moroccan_Berber; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=ej4QsJfuqbM>.

¹²⁷ Lingvajn ekzemplojn vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=hi_uVfBfTL, <https://www.youtube.com/watch?v=7gTzNQvnYBU> kaj <https://www.youtube.com/watch?v=HvoHDLyAsv8>.

¹²⁸ Vd. <https://www.gfbv.de/de/news/anhaltende-proteste-von-masiren-in-algerien-und-marokko-8937>.

¹²⁹ Vd. <http://www.ruedt.ch/tunesien/berber.htm>, https://www.deutschlandfunk.de/berber-architektur-in-tunesien-bedrohtes-kulturerbe.2016.de.html?dram:article_id=443009.

¹³⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tuareg_people.

¹³¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Koptische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=41QCT7pF4VU>.

¹³² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/San_people.

kiu ampleksas 159 sonojn, de kiuj ĉirkaŭ la duono estas klaksonoj.¹³³ Klaksonojn konas ankaŭ la lingvo *Xhosa*, kiu estas bantua lingvo kaj parolata de ĉirkaŭ 9 milionoj da homoj en **Sudafriko**, **Bocvano** kaj **Lesoto**.¹³⁴ La fondaĵo de la germana firmao Volkswagen financas la programon DoBeS, per kiu oni dokumentas minacatajn lingvojn. Ĝi ĉefe okupiĝas pri la lingvo !Xóǀ. La sciencistoj registras parolajn kontribuadojn de ĝiaj parolantoj kaj esploras la historion kaj gramatikan strukturon de tiu lingvo. Per tiu agado oni volas atingi, ke la lingvo !Xóǀ estu agnoskita de la komunumo de la plimulto en la koncernaj regionoj.

Dum la lingvo !Xóǀ eble povos esti savita, multaj aliaj Khoisan-lingvoj kiel *Tuu* kaj *Xiri* de la familio de la Kwadi-Khoe-lingvaro, kies 90 parolantoj vivas en Sudafriko, verŝajne nesaveble elmortos.¹³⁵

Alia tia samspeca tribo ekzemplo, la *masaja* lingvo, estas parolata en **Kenjo** kaj **Tanzanio** de ĉirkaŭ 950 mil homoj (1994). Tiu indiĝena lingvo estas esenca por la konservado de la tradicia nomada vivmaniero de la masaja popolo. Do, la disfalo de la masaja lingvo signifus grandan danĝeron por la pluvivado de la koncerna tribo. Ĝia statuso kiel minoritata lingvo jam limigis tradiciajn masajajn praktikojn. Pli kaj pli da masajoj rezignas pri sia tradicia nomada vivo, preferante fiksjajn koherajn loĝ-strukturojn, kio havas ankaŭ negativajn sekvojn por la praktikado de la tradicia lingvo.¹³⁶

Azio

En neniu alia kontinento ekzistas pli granda lingva diverseco ol en Azio. Temas ankaŭ pri kontinento, kie samtempe multaj lingvoj, eble miloj, estas minacataj de la malapero kaj elmortado. Aparte granda estas la lingva diverseco en la montaraj regionoj de nordorienta **Hindio** kaj en la Himalajo. En Hindio estas parolataj pli ol cent diversaj idiomoj.¹³⁷ La multegaj lingvoj estas indico por grandega etna diverseco en la hindia sub-kontinento. En neniu alia lando ol Hindio vivas tiel multaj praloĝantoj. Tiuj pli ol 90 milionoj da anoj de indiĝenaj popoloj de Hindio lamentas de jardekoj pri diskriminado kaj marĝenigo, ĉar la diversaj rajtoj de tiuj popoloj kaj homoj, inter alie lingvaj, estas grandstile lezataj. Ankaŭ en neniu alia lando de la mondo pli granda nombro da lingvoj estas minacataj ol en Hindio. En la momento la ekzisto de ĉirkaŭ 200 indiĝenaj lingvoj de Hindio estas draste minacataj.

Kelkaj aliaj forte minacataj lingvoj en Hindio estas tiuj de la *Juang*-oj (aŭ *Pattu*-oj) en la ŝtato **Orisa** (aŭ Odiŝa),¹³⁸ *Kom*-oj en la ŝtato **Manipur** ĉe la limo al Birmo (Burmo aŭ Mjanmo),¹³⁹ *Mising*-oj en la ŝtato **Asam**,¹⁴⁰ kaj *Toda*-oj en la ŝtato **Tamil Nadu** en suda Hindio, kies lingvo estas konata pro siaj frikativaj kaj vibraj sonoj.¹⁴¹ Ĉar tiuj lingvoj estas sen skribo kaj limigitaj al la familia uzado, ili riskas esti asimiligitaj de la pli grandaj lingvoj, kiuj servas kiel oficialaj lingvoj en la koncernaj ŝtatoj kiel la lingvoj *oria* (aŭ *odia*), *asama* aŭ *tamula*.¹⁴²

Unu el la ekzemploj de draste minacata lingvo estas tiu de la *Jaravoj*, kiu estas parolata sur la **Andamanaj insuloj** en la Hinda Oceano, kiuj estas parto de la Hinda Unio. Ĉi tiu idiomo apartenas al la familioj de la andamanaj lingvoj, kiuj estas izolata grupo, de kiuj ekzistas ankoraŭ tri de iam pli ol dek idiomoj. En 2006 ekzistis ankoraŭ 250 parolantoj de la jarava lingvo. Sen la permeso de la registaro en Novdelhio neniu rajtas viziti la rezervejojn, en kiuj vivas tiuj praloĝantoj. Post kiam aperis koloniistoj el Hindio kaj Birmo, la Jaravoj malsaniĝis pro manko de imuneco kontraŭ la malsanoj, kiujn ili antaŭe

¹³³ Vd. ankaŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Taa_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=lOpLyN0KD3Q>, <https://www.youtube.com/watch?v=W6WO5XabD-s>, <https://www.youtube.com/watch?v=cSoq2hy0CUg>.

¹³⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Xhosa_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=S_tmbaxMUsw.

¹³⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Khoisan_languages.

¹³⁶ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Maasai_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=ypsikgmXQU8>.

¹³⁷ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Languages_of_India.

¹³⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Juang_language.

¹³⁹ Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Kom_language_\(India\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Kom_language_(India)) kaj [https://en.wikipedia.org/wiki/Kom_people_\(Manipur\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Kom_people_(Manipur)).

¹⁴⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Mising_language.

¹⁴¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Toda_language.

¹⁴² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Odia_language, https://en.wikipedia.org/wiki/Assamese_language, https://en.wikipedia.org/wiki/Tamil_language.

ne konis pro sia ekstrema izoliteco. Tiu popolo estis preskaŭ estingita pro la disvastiĝo de la morbito. En 2004 la hinda registaro dekretis novan politikon, kiu devis havigi al la Jaravoj pli da aŭtonomeco. Al la lokaj aŭtoritatoj oni ripročas, ke ili ne sufiĉe okupiĝas pri la praloĝantoj, sed agas ĉantaŭ ĉio en la intereso de la koloniistoj, kiuj volas akceli la ekonomian evoluon de la Andamanoj, kiujn vizitas ankaŭ pli kaj pli da turistoj. Estas do klare, ke la pluekzistado de la jarava lingvo senpere dependos de la fizika pluvivado de ĝiaj parolantoj kaj de la savado de iliaj rajtoj per jura protektado.¹⁴³

Krom *sinhaloj* kaj *tamuloj*, en **Srilanko** ekzistas 37 mil *burgeroj* (2012), kiuj estiĝis el miksataj geedziĝoj de eŭropaj koloniistoj (precipe portugaloj, nederlandanoj kaj angloj) kun sinhaloj kaj tamuloj. La plimulto de la burgeroj vivas en la ĉefurbo Kolombo. Iam la burgeroj parolis aŭ la anglan aŭ nederlandan aŭ portigalan (kreolan) lingvon. Ilia socie privilegiata situacio draste ŝanĝiĝis, kiam en 1956 la sinhala estis proklamita kiel ŝtata lingvo. Multaj burgeroj forlasis la landon. La resto perdis sian socian signifon, adaptiĝis al la lokaj cirkonstancoj kaj asimiliĝis kun la bunta popolo de Srilanko. Hodiaŭ, la plimulto de la burgeroj parolas la sinhalan lingvon. Sed laŭ la censo de 2012 burgeroj parolis aŭ 73,6% (t.e. 24'412) ankaŭ la anglan, dum 88,3% (t.e. 29'277) parolis ankaŭ la tamulan, depende de la loĝloko.¹⁴⁴

La *maŭroj* (Moors) de Srilanko estas sunaismaj muzulmanoj de la ŝafiisma direkto kaj parolas la tamulan kiel gepatran lingvon. La 1,9 milionoj da maŭroj konsistigas 9,2 procentojn de la loĝantaro de Srilanko (2012) kaj do formas la trian plej grandan etnan grupon de la lando post la sinhala kaj tamuloj. Tamen, la srilankaj maŭroj ne konsideras sin tamuloj, sed kiel apartan etnon kaj kutime nomas sin "muzulmanoj". Kvankam la tamillingvaj muzulmanoj formas la plimulton (pli ol 90 procentoj) de ĉiuj muzulmanoj de Srilanko, ekzistas ankoraŭ aliaj muzulmanaj grupoj kiel la hindiaj kaj la malajaj.¹⁴⁵

Indiĝena popolo en Srilanko estas la *veddoj* kun ĉirkaŭ 2500 membroj (2002), kiuj loĝas en la suda mezo de la lando esence en Heningala (apud Girandurukotte), en la nacia parko Maduru Oya kaj en la ĝangalo de Mahiyangana. Tiuj praloĝantoj vivas en malgrandaj klanoj, kiuj estas regataj de reĝa klano kaj ties reĝo. La origino de ilia lingvo estas malklara: Aŭ temas pri propra lingvo aŭ pri sinhala dialekto por marki, ke tiu idomo diferencas de la sinhala lingvo kaj ke la tribo mem tamen distingas sin de la sinhala etno.¹⁴⁶

La demando, ĉu burgeroj, maŭroj kaj veddoj de Srilanko kaj iliaj lingvoj estas ekzist-minacataj aŭ elmortontaj popoloj, estas dume malfacile respondebla.

Sed ankaŭ **Indonezio** apartenas kun siaj pli ol 700 lingvoj al grupo de ŝtatoj, en kiu la lingva diverseco estas forte minacata. Konkrete: 147 lingvoj estas minacataj de la malapero. Kun pli ol 45 milionoj da praloĝantoj Indonezio estas la patrujo de centoj da indiĝenaj popoloj. Pro la progresanta detruado de la pluarbaro pro konstruado de industrio, rikoltado de ligno kaj starigo de grandaj plantejoj pli kaj pli da indiĝenaj popoloj perdas sian vivobazon. Kvankam la landa justico antaŭe nur malofte persekutis lezojn de la homaj rajtoj, en 2005 Indonezio ratifis la *Internacian Pakton pri burĝaj kaj politikaj rajtoj* kaj la *Internacian Pakton pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj*. En la sekvaj jaroj diversaj reguligoj de la punkodo, kiuj antaŭe servis al la persekutado de opoziciuloj, estis proklamitaj kiel kontraŭ-konstituciaj. Malgraŭ tiuj ŝajnaj plibonigoj, laŭ Amnestio Internacia en Indonezio daŭre okazas drastaj lezoj de la homaj rajtoj.

Se temas pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj, aparte drasta estas la kazo de la lingvo *Damal* de la popolo *Amungme* (*Amung-oj*), en la **Papua provinco de Indonezio**, kiuj lastatempe fariĝis viktimo de aparte drasta lezado de la homaj rajtoj. Ĉar ili ĝenis la laboron en la minejo en sia loĝzono, kie iu grandentrepreno ekspluatas kupron kaj oron, 173 mil anoj de tiu popolo estis translokitaj. La montaroj, kiuj estas sanktaj por ili, estis detruitaj de la industrio kaj la natura pejzaĝo estis komplete ŝanĝita. La konsilio de la koncernata tribo batalas de jaroj kontraŭ tiu maljusteco. La tuta aĉa traktado de la popolo kaŭzis, ke en la jaro 2007 oni nombris 5000 parolantojn de la koncerna lingvo, kvankam sep jarojn antaŭe estis ankoraŭ 14 mil.¹⁴⁷

¹⁴³ Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Jarawa_language_\(Andaman_Islands\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Jarawa_language_(Andaman_Islands)).

¹⁴⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Burgher_people#Language

¹⁴⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Sri_Lankan_Moors, <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ŝafiismo>;
https://en.wikipedia.org/wiki/Sri_Lankan_Tamils.

¹⁴⁶ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Vedda>.

¹⁴⁷ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Amung_people.

Alia indonezia popolo, kiu estas koncernata de la lezado de la homaj rajtoj pro industria enmiksiĝo, estas la **Morori**-oj (aŭ **Moraori**-oj), kiuj vivas en unu vilaĝo de la sama **Papua provinco**, kiu estis kontraŭleĝe okupita de Indonezio en 1962. En tiu regiono oni industrie ekspluatas palmoleon, kio kaŭzis grandstilan detruadon de la pluvarbaro, torfejoj kaj marĉoj. Homrajtaj organizaĵoj observis perfortajn forpelojn de indiĝenoj en la koncerna regiono fare de lakeoj de la palmoleaj konzernoj. Se oni sekigas la marĉon de la Morori-oj, entute la klimato povas ŝanĝiĝi kaj detru la vivofundamenton de la tieaj loĝantoj. Alia problemo estas la lingva asimilado de la praloĝantoj, kiuj estas devigataj lerni la indonezian lingvon. La indonezia registaro ignoras la rajtojn de tiuj homoj kaj entute fajfas pri la protesto flanke de homrajtaj aktivuloj.¹⁴⁸

En **Novgvineo**, kie loĝas centoj da indiĝenaj popoloj, centoj da etnaj lingvoj estas minacataj de la pereco. Ankaŭ tie la ekzistado de la indiĝenaj komunumoj estas minacata de la detruado de la tradicia vivmaniero kaj pli kaj pli vasta kultura asimiliĝo.¹⁴⁹

La internacie konata agresema subprema politiko de Pekino en **Tibeto** kaj orienta **Turkestano**, kiuj apartenas al Popola Ĉinio, havas detruajn sekvojn por la pluekzistado de la **tibetaj** kaj **ujguraj** kulturoj kaj lingvoj. Kvankam ĝuste tiuj etnaj minoritatoj postulas vastajn rajtojn kadre de la regiona aŭtonomeco, la ĉinaj komunistoj en Pekino krude ignoras tiujn dezirojn kaj tretas iliajn rajtojn per piedoj, malgraŭ ke la ĉina registaro fanfaronas pri sia modela etnolingva politiko, kiu estas nura propaganda trompo.¹⁵⁰ Ĉie en la mondo, kie ankoraŭ regas stalinismaj (aŭ maoismaj) komunistoj, oni observas la fenomenon de grandstilaj lezoj de la homaj homaj rajtoj, plej draste en Norda Koreio. La **ujgura** lingvo estas pli kaj pli eliminata el la lernejoj, la urboj en **Singkiango** estas ĉinigitaj kaj sen bonaj ĉinlingvaj konoj estas malfacile fari profesion karieron aŭ eĉ nur ricevi laborlokon. Lastatempe atingis la Okcidenton novaĵoj, laŭ kiuj en Singkiango ekzistas koncentrejoj, en kiuj ĉirkaŭ unu aŭ du milionoj da homoj, ĉefe ujuguroj, estas internigitaj sub gulagaj kondiĉoj.¹⁵¹

La dramo de la **tibeta** popolo estas konata de jardekoj. Kvankam la ĉina registaro propagandas rozkoloran bildon pri la apogo de la tibeta lingvo, la realeco aspektas tute alie. La religia ĉefo de la tibetanoj, la 14a Dalajlamao, ripete kritikis la ĉinan registaron, ke ĝi lezas la aŭtonomecan statuson de Tibeto, ke eĉ ĉinajn leĝojn kaj internaciajn konvenciojn ĝi ne respektas, kaj riproĉas al ĝi, ke ĝi praktikas etnocidon en Tibeto. Dum en Tibeto mem vivas ses milionoj da homoj, ĉirkaŭ 200 mil tibetanoj vivas en la ekzilo precipe en Nepalo, Hindio kaj Butano. Tibetanoj, kiuj fuĝis al eksterlando, fariĝis senŝtatanoj kaj ne rajtas viziti siajn parencojn en sia patrujo. Rifuzitaj azilpetantoj restas fiksataj en la diasporo, ĉar ili ne povas esti resenditaj al Ĉinio. Eĉ Svislando, kie la tibetanoj estis bonvenaj dum jardekoj, malfavore ŝanĝis la regulojn: Dum antaŭe tibetanoj povis esti registritaj kiel „senŝtatanoj“ aŭ kiel ŝtatanoj de „Tibeto (Ĉina Popola Respubliko“, ekde novembro 2014 eblas nur registriĝo kiel ŝtatanano de „Ĉinio (Popola Respubliko“. Tibetanoj, kiuj publike manifestacias favore al sia afero en eksterlando, timas, ke ili estas observataj de la sekreta servo de Ĉinio aŭ arestataj de la loka polico. Pro tiu duobla timo multaj tibetanoj ne partoprenas tiajn protestojn, ĉar ili ankaŭ timas, ke la parencoj en la patrujo povus ekhavi problemojn.¹⁵²

La **tibeta** estas krom la ĉina lingvo oficiala lingvo en la „Aŭtonoma Tibeta Regiono“ kaj en aliaj partoj de Ĉinio, kie vivas tibetanoj. En Tibeto mem aperas 14 revuoj kaj 10 ĉiutagaj gazetoj en la tibeta lingvo, al kio aldoniĝas manpleno da regionaj kaj naciaj tibetaj gazetoj kaj revuoj en aliaj partoj de Ĉinio. Ekzistas radio- kaj televidostacioj kaj kinejaj filmoj en la tibeta lingvo (precipe en la dialektoj de Lhasa kaj Kamba). Naŭ eldonejoj publikigas librojn en la tibeta lingvo – ĉiujare aperas ĉirkaŭ mil titoloj. Oficiale, la registaro, justico kaj administracio kiel ankaŭ la strataj tabuloj kaj reklamaj afiŝoj estas

¹⁴⁸ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Moriori>.

¹⁴⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Languages_of_Papua_New_Guinea, https://de.wikipedia.org/wiki/Indigene_Völker#Konfliktfelder.

¹⁵⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Standard_Tibetan kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Uyghur_language.

¹⁵¹ Vd. <https://www.tagesschau.de/ausland/uiguren-china-101.html>, <https://www.sueddeutsche.de/politik/tuerkei-china-soll-kzs-fuer-uiguren-schliessen-1.4323787>, <https://www.srf.ch/news/international/muslim-minderheit-in-china-china-legalisiert-umerziehungslager-fuer-uiguren>, <https://www.epochtimes.de/china/2-millionen-inhaftierte-in-konzentrationslagern-in-xinjiang-kp-laesst-gefangene-uiguren-abtransportieren-a2670622.html>, <https://derstandard.at/2000100440431/Konzentrationslager-in-Xinjiang-nur-internatsaehnliche-Schulen>.

¹⁵² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Tibeter#Politische_Situation, https://de.wikipedia.org/wiki/Tibeter_in_der_Schweiz, <https://www.srf.ch/news/schweiz/tibeter-in-der-schweiz-chinas-schatten-ueber-der-diaspora>, <https://www.srf.ch/news/schweiz/tibet-fluechtlinge-uerwuensch>.

dulingvaj. Inter 1987 kaj 2002 Pekino publikigis tri dekretojn pri la „uzado kaj evoluigo“ de la tibeta lingvo en Tibeto.¹⁵³ En 98% de la bazaj lernejoj en Tibeto la tibeta estas la instruata lingvo, 92% de la instruistoj en tiuj lernejoj estas tibetanoj. Samtempe oni instruas la ĉinan kiel „*fremdlingvon*“. En 2002 ekzistis 181 tibetlingvaj lernolibroj por 16 instruataj fakoj. La tekstoj en la lernolibroj pri tibetaj lingvo kaj literaturo estis ĉerpitaj je 47% el la moderna kaj nuntempa tibeta literaturo, je 29% el la tradicia tibeta literaturo kaj je 24% el tradukoj el ĉinlingvaj verkoj. En la duagrada kaj mezlernejoj oni utiligas ĉefe la ĉinan lingvon inter alie por instrui matematikon, fizikon kaj kemion. En la universitatoj kaj altlernejoj de Tibeto la instruado okazas plejparte en la ĉina lingvo, krom se temas pri fakoj ligataj kun tibetaj historio, lingvo kaj literaturo kaj tradicia tibeta medicino.¹⁵⁴ Certe, ĉiuj tiuj formalajoj en la tibeta lingvo ne sufiĉas por kontentigi la bezonojn de la tibeta kulturo (kiu unuavice estas religieca), se oni konsideras la senkompatan politikan cenzuron de la komunistoj kaj la politike unuflankan karakteron de la menciitaj informaj produktoj kaj klerigaj servoj. Malgraŭ tiuj malklaraj cirkonstancoj, la tibetanoj apartenas al la plej malasimiliĝintaj popolgrupoj de Ĉinio; 84% de la tibetanoj praktike uzas la propran lingvon por la komunikado. Multaj tibetanoj vivas en la kamparo, kie la tibeta lingvo estas grandparte praktikata malgraŭ klopodoj enkonduki la ĉinan lingvon. Grandparto de la plenkreska tibeta tavolo estas senalfabetuloj kaj multaj gepatroj ne havas la okazon sendi siajn infanojn en la lernejojn.

La demando, ĉu la tibeta lingvo apartenas al la ekzist-minacataj lingvoj, estas internacie kontestata. Dum iuj okcidentaj politikistoj asertis, ke la ĉina registaro aplikas konscian detruan politikon por neniiĝi la tibetajn kulturon kaj lingvon, iuj fakuloj konstatis, ke Ĉinio male eĉ klopodas en limigita grado subteni aŭ almenaŭ malignori la tibetan kulturon. Tio povas esti. Iu usona scienca revuo skribis, ke neniu aktuala studo konfirmas, ke la tibeta lingvo estas ekzist-minacata. La ĉina registaro tamen senkomplete procedas kun tibetanoj, kiuj kritikas la ĉinan politikon rilate la subtenon kaj evoluigon de la tibeta kulturo, kiel montras la kazo de la 30-jara Taŝi Wangĉuk, kiu estis kondamnita en majo 2018 al kvinjara arestado en prizono, ĉar li volis protesti kontraŭ la aŭtoritatoj, kiujn li volis devigi, ke ili faru pli multe por subteni la tibetan klerigon, alikaze li timis, ke la kulturo de la tibeta popolo estingiĝos.¹⁵⁵

Lige kun la drasta malboniĝo de la homaj rajtoj en Ĉinio Pekino akiris ankaŭ la reĝimon en Tibeto per novaj kampanjoj, minacoj kaj reprezalioj kontraŭ tibetaj aktivuloj. Tiel, depost 2008 pli ol 60 tibetaj intelektuloj estis arestitaj laŭ diversaj malklaraj akuzoj pri „separatismo“. Inter ili troviĝis muzikistoj, poetoj, verkistoj kaj eldonistoj. Post la perforta disbatado de protestoj precipe inter junaj intelektuloj okazis renaskiĝo de la origina tibeta identeco, kiu esprimiĝis ĉefe en nove kreitaj muziko, poemoj kaj libroj. Sed tio povis okazi nur en modesta kadro por eviti kunpuŝiĝon kun la ĉina cenzuro. Sed eĉ tiu sceno estis disbatita kaj paralizita per arestoj kaj mal-permesoj. Multaj arestitoj estis kondamnitaj al multjaraj arestoj en malliberejo. La ĉinaj komunistoj reagis per „politika reedukado“ kaj „plibonigaj kampanjoj“ por tibetanoj. Monaĥoj, monaĥinoj aŭ laikuloj estis devigitaj trapasi „reedukajn“ programojn por senkreditigi kaj misfamigi la Dalajlamaon kaj subskribi sian personan distanciĝon de li. Ĉar tiaj kampanjoj restis kutime sen granda efiko, la ĉinoj lanĉis novajn kampanjojn en la koncernaj regionoj. Monaĥojn kaj monaĥinojn oni minacis per forigo el siaj monaĥejoj kaj sesmonata „reedukado“, se ili „enmiksiĝas en registarajn aferojn“. Ĉi tiu reguligo povas trafi ĉiujn tibetanojn, kiuj partoprenas en „kontraŭleĝaj“ agadoj de tibetaj aktivuloj. Al tiuj agadoj apartenas protestoj kontraŭ la prefero de la ĉina lingvo en la lernejoj kaj kunvenoj lige kun lingvaj postuloj, funkciigo de lingvaj organizaĵoj, verkado, produktado kaj publikigo de libroj, artikoloj, filmoj kaj muzikaĵoj kun „separatista enhavo“, aŭskultado kaj legado de eksterlandaj amaskomunikiloj kaj disvastigo de informoj el Tibeto al eksterlandaj medioj kaj kontaktado de „separatistaj fortoj“, vojaĝo el Tibeto por partopreni religiajn aranĝojn en eksterlando aŭ festivalojn organizatajn de eksterlandanoj, kiuj celas okupiĝi pri la tibeta sendependeco. Malpermesataj estas ankaŭ la posedo kaj pendigo de bildoj de la Dalajlamao, la organizado de preĝado por li en publikaj lokoj „en la nomo de la religio kaj tradicio“, la almetado de afiŝoj, kiuj montras signojn de la tibeta sendependeco aŭ la disaŭdigo de muziko kun simila enhavo en aŭtomobiloj. Pri „malstabiligo de la ordo“ oni parolas, se tibetanoj „devigas aliajn homojn paroli nur la tibetan lingvon“, ktp. laŭ listo de 20 „kontraŭleĝaj aktivecoj“, kiu estis anoncita en la regiono de Rebkong komence de 2015.). Ankaŭ registaraj reprezentantoj estis minacataj per puno, se ili ne respektas tiujn regulojn. Alia direktivo koncernis la detruon de religiaj konstruaĵoj, inkluzive monaĥejoj kaj aliajn preĝejojn,

¹⁵³ Mi ne havis la okazon legi tiujn dekretojn por kompreni pri kio konkrete temas(vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Tibetische_Sprache, piednotoj 7-9).

¹⁵⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Tibetische_Sprache.

¹⁵⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Standard_Tibetan.

kiuj estis konstruitaj post 2011. La monaĥejoj estis ĉikanataj laŭ diversaj manieroj. Tibetanoj nur malfacile povas ricevi pasporton por vojaĝi. Por ŝajnigi feliĉan vivon en Tibeto, tibetanoj estas devigataj prezenti tradiciajn tibetajn aktojn por montri, ke oni povas ekzekuti ilin. Okazas timigo, kontrolado kaj indoktrinado de la tibetanoj, nomadoj estis perforte translokitaj al komunismaj kooperativoj, kio kontribuas al senpera detruado de la tradicia vivmaniero de la tibetaj nomadoj. Ktp. ktp.¹⁵⁶

Malgraŭ tiuj informoj, kiuj estas tre maltrankviligaj kaj donas impreson pri la situacio en tiu lando, estas malfacile scii, kio reale okazas en Tibeto. Al eksteraj personoj kiel ĵurnalistoj, homrajtaj aktivuloj, turistoj kaj eksteraj tibetanoj mem la ĉinaj aŭtoritatoj malhelpas aŭ malpermesas viziti Tibeton. Ĝeneraligi kaj pritaksi la situacion de la tibeta lingvo estas tre malfacile, ĉar mankas plena super-rigardo pri la lingva pejzaĝo de la vasta montara lando, kies valoj, vilaĝoj kaj homoj estas tre malfacile atingeblaj, kaj la direktivoj de la ĉinaj aŭtoritatoj estas efektivigitaj en la unuopaj lokoj laŭ diversa maniero. Ekzistas granda nombro de diversaj tibetaj idiomoj kaj dialektoj, kiuj estas parolataj en Ĉinio, Pakistano, Hindio, Nepalo kaj Bhutano, sed mankas centra mapo, en kiu tiuj ĉirkaŭ 200 idiomoj estas ekzakte indikitaj.¹⁵⁷

Se en ĉinia Tibeto mem la tibeta lingvo dume povas esti konservata, ekzistas iuj branĉoj de la tibeta lingvo, kiuj estas ekzist-minacataj, kiel ekzemple la *ladakha* branĉo, kiu apartenas al la okcident-tibeta grupo. Ĉi tiu dialekto estas pli kaj pli forpuŝata de la angla kaj hinda lingvoj, kio estas ligata kun la elmortado de la tibeta kulturo en la koncernata regiono. Ankaŭ la proksima *Balti*-lingvo estas endanĝerigata; ĝi eĉ estis anstataŭigita per la persigita *hindustana Urdu-lingvostandardo* en **Baltistano (Pakistano)**, ĉar precipe la homoj, kiuj alvenas en tiu regiono, utiligas tiun normon, kiu funkcias kiel nacia lingvo kaj *lingua franca* de Pakistano.¹⁵⁸

Se pluri al **Japanio**, ekstreme minacata estas la ekzisto de la lingvo *Ainu* (aŭ *Itak*), la lingvo de la samnomaj praloĝantoj sur la japana insulo *Hokaido*. Kvankam ĉirkaŭ 25 mil personoj konsideras sin anoj de la Ainu-popolo, nur 15-20 (!) homoj de la maljuna generacio ankoraŭ scipovas tiun lingvon, kiu diserigis en dudeko da dialektoj. La ĉefa kaŭzo por la elmortado de tiu lingvo estas la giganta asimila premo en Japanio. Malgraŭ la diskriminado de la Ainu-oj, kiuj ofte prisilentas sian veran originon, multaj junaj homoj de tiu tribo komencis reserĉi siajn radikojn kaj volas konatiĝi kun sia tradicia kulturo. Aperis multaj lingvokursoj por Ainu, ekzistas radioprogramo. Tra la muziko kaj la interreto junaj Ainu-oj trovas la eblon remalkovri siajn lingvon, kulturalan identecon kaj memkonscion kiel indiĝenoj de Japanio.¹⁵⁹

Kiel malgranda lingva universo prezentas sin **Butano** kun ties dudeko da diversaj lingvoj, inter kiuj elstaras la lingvo *Dzongkha*, kiu kvazaŭ estas tibeta dialekto kaj funkcias kiel nacia lingvo. En 2013 171 mil homoj indikis tiun lingvon gepatra, kvankam entute 640 mil parolas ĝin. Dzongkha plus *Lepcha* (aŭ *Rong*, 66'500 parolantoj) estas uzataj precipe en okcidenta Butano, dum en la oriento estas disvastigataj amaseto da aliaj idiomoj kiel la *Khams-tibeta* (1,4 milionoj da parolantoj), *Tshangla* (aŭ *Sharchop* kun 170 mil parolantoj), *Kheng* (50 mil), *Dzala* (22 mil), *Bumthang* kaj *Chocha Ngacha* (po 20 mil parolantoj) kaj *Kurtöp* (15 mil). Malpli ol 10 mil parolantojn nombras la lingvoj *Nyenkha* (8700), *Lakha* (8000), *Brokpa* (5000), *Gongduk* kaj *Takpa* (po 2000), *Chali* (1500), *Olekha* (500) kaj *Brokkha* (300), pro kio la ekzistado de tiuj lingvoj devas esti konsiderata kiel minacata.¹⁶⁰

En **Bangladeŝo** vivas aro da malgrandaj popoloj de praloĝantoj, kiuj apartenas al la triboj de la tibet-birma familio. Inter ili menciindas la *Bawm*-oj (6-20 mil), *Khumi*-oj (2090), *Pankho*-j (2500), *Asho*-j (2340), *Chak*-oj (aŭ *Sak*-oj 5500) kaj *Riang*-oj (500). Tiuj grupoj vivas tre izolite kaj estas forte minacataj en sia pluekzisto. Kvankam la konstitucio de Bangladeŝo permesas la instruadon de la gepatraj lingvoj de la trideko da indiĝenaj popoloj, la kleriga sistemo de la lando estas unulingva, nome pure *bengala*. Al la registaro en Dako ne nur mankas financaj kaj personaj rimedoj, sed ankaŭ la intereso kaj politika volo por konservi la lingvojn de la etnaj minoritatoj de la lando, des pli ke ne ekzistas skriba

¹⁵⁶ Vd. https://gstf.org/wp-content/uploads/2017/02/Factsheet_Aktuelle-Situation.pdf.

¹⁵⁷ Vd. <https://www.fluechtlingshilfe.ch/assets/herkunftslander/asien-pazifik/china-tibet/151210-chn-sprachen.pdf>.

¹⁵⁸ https://en.wikipedia.org/wiki/Balti_language; <https://en.wikipedia.org/wiki/Urdu>,

<https://de.wikipedia.org/wiki/Hindustani>.

¹⁵⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ainu_people; lingvajn ekzemplojn en Ainu vd. sub

<https://www.youtube.com/watch?v=jR5JFsGTXGw>.

¹⁶⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Languages_of_Bhutan.

formo de tiuj idiomoj por povi instrui ilin en la lernejoj. Iom pli bona estas la situacio de la *Cakm*-oj kaj *Marm*-oj, kiuj havas 350 resp. 150 mil komunumanojn kaj lingvojn kun skriba formo.¹⁶¹

Internacian atenton kaŭzis la sorto de la popolo *Rohingya*, kiu estas bengala tribo, kiu vivas en sudokcidenta Birmo (Mjanmo), de kie ĝi estis forpelata en la pasinta tempo en pluraj ondoj. Ĝis la plej aktuala konflikto en 2017 en la koncerna regiono (**Rakhaing**-ŝtato, eksa Arakanio) vivis unu miliono da tribanoj. Laŭ la leĝo pri ŝtataneco de 1982 la Rohingya-popolo ne estas konsiderata kiel unu el la 135 aŭtoktonaj etnaj grupoj en Mjanmo kaj sekve ne rajtas posedi la civitanecon de tiu ŝtato, kiu estas regata de brutalaj armegeneraloj. Unuiĝintaj Nacioj (UN) klasifikis tiun popolgrupon plej forte persekutata etna minoritato en la mondo.¹⁶²

Apenaŭ konscia oni estas pri la fakto, ke en la montaro de **norda Tajvano** ĉirkaŭ 20 mil homoj (2008) parolas la lingvon *Seediq*, kiu apartenas al la formoza subgrupo de la aŭstroneziaj lingvoj, kun tre inte-resaj lingvistikaj specifajoj.¹⁶³

La *kurda* lingvo, kiu konas plurajn variantojn kaj apartenas al la hindeŭropa lingva familio, estas parolata precipe en orienta **Turkio**, norda **Sirio**, norda **Irako** kaj nordokcidenta kaj okcidenta **Irano**. En Irako la kurda havas la statuson de oficiala lingvo, dum en Sirio la publikigo de materialoj en tiu lingvo estas malpermesata, kvankam tiu malpermeso ne estas realisma pro la milita situacio en tiu lando. Tre malfacila estas la ekzistado de la kurda lingvo en Turkio. Antaŭ aŭgusto 2002 la turka registaro (Erdoĝan) forte limigis la uzadon de la kurda lingvo en sia lando kaj eĉ malpermesis ĝin en klerigaj instalaĵoj kaj en la radio. En marto 2006 Turkio permesis privatajn radio-elsendojn en la kurda lingvo. La ŝtata turka radio- kaj televidosocieto (TRT) lanĉis en januaro 2009 kurdan televidan programon, evidente por propagandaj celoj. En 2010 kurdaj komunumoj en sudorienta Turkio komencis presi gedziĝajn dokumentojn, fakturojn kaj stratabulojn kaj aliajn indikilojn en la kurda lingvo apud la turka. Ankaŭ imamoj komencis preĝi en la kurda lingvo. La kurda alfabeto tamen ne estas agnoskita en Turkio, kaj antaŭ 2013 la uzado de kurdaj nomoj kun la literoj x, w kaj q, kiuj ne ekzistas en la turka lingvo, estis malpermesataj. En 2012 la kurda funkcias kiel fakultativa lingvo en publikaj lernejoj. Ĝis nun la kurda klerigo eblis en principo nur kadre de privataj instalaĵoj. Ĉiuj tiuj faktoroj kontribuis, ke multaj kurdoj de Turkio malbone aŭ entute ne plu parolas la kurdan lingvon. En Irano la kurda lingvo estas uzata en kelkaj lokaj amasmedioj kaj gazetoj, sed ne en publikaj lernejoj.¹⁶⁴

En **Kirgizio** 96,4% kaj en **Kazahio** 88,7% de la kurda popolo parolas la kurdan kiel gepatran lingvon.¹⁶⁵

Kun sia aparta neislama religia tradicio la *jezidoj* estas konsiderataj kiel parto de la kurda popolo, kiu parolas la nordan varianton de la kurda lingvo, nomata *Kurmanĝi*. Jezidoj esence vivas en norda Irako, norda Sirio kaj nordorienta Turkio, sed jezidaj komunumoj ekzistas ankaŭ en Armenio kaj Kartvelio, kie ili estas diskriminaciaj. En Germanio grandaj grupoj de jezidoj loĝas ĉefe en Nordrejn-Vestfalia kaj Saksio. Entute oni taksas ilian nombron inter 300 mil kaj 1 miliono da anoj. En aŭgusto 2014 la jezidoj fariĝis viktimoj de la persekutado kaj mortigado fare de la terorisma „Islama Ŝtato“. Laŭ UN la jezidoj, kiuj estis jam viktimoj de la otomana tempo, estas reale minacataj de genocido, ĉar la islamismaj teroristoj provis estingi tiun popolon, kiun ili konsideras „nekredantoj“ kaj „paganoj“. La plimulto de la jezidoj ne plu povas kaj ne plu volas reiri al Irako, tiel ke la jezidoj preferas vivi ekster tiu lando.¹⁶⁶ La ekzistado de la jezida popolo do estas supozeble pli forte minacata ol la kurda lingvo mem, kiun ĝiaj anoj parolas.

¹⁶¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Languages_of_Bangladesh.

¹⁶² Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Rohingya>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=dRIfr2WAYY>, <https://www.youtube.com/watch?v=f9o9OGmDHmg>, <https://www.youtube.com/watch?v=BP4-f4ftK-k>.

¹⁶³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Seediq_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=KbmxnsV2wa4>.

¹⁶⁴ Popolojn en Turkio vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Volksgruppen_in_der_Türkei.

¹⁶⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kurdische_Sprachen kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Kurdish_languages#Current_status; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=HzafvKxAGEI>; lingvan komparon kun parencaj lingvoj vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=BzkSrsK0grU>.

¹⁶⁶ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Jesiden>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Kurmandschi>.

En Irano vivas *baĥtiaroj, beluĉoj, gilakoj, kumzaroj, kurdoj, luroj, masanderanoj, osetoj, parsoj, paŝtunoj, persoj, jagnoboj, taĝikoj, taliŝoj, cacoj*.¹⁶⁷

En Afganio oni parolas ĉirkaŭ 49 lingvojn kaj pli ol 200 diversajn dialektojn. En 1964 la parlamento decidis, ke la persa (*Dari*) kaj *paŝto* (aŭ *paŝtu*) estu la oficialaj lingvoj de la lando.¹⁶⁸

Kiel ekzempla lingvopolitiko *Uzbekio* aplikas jenan trioblan lingvomodelon: la regiona lingvo (ekzemple *karakalpaka*) funkcias kiel loka lingvo de la koncerna aŭtonoma etna zono, la *uzbeka* kiel nacia lingvo kaj la *angla* kiel internacia lingvo. En ĉiuj eksaj sovetiaj respublikoj, la *rusa* lingvo estis abolita kiel oficiala lingvo (kvankam ĝi ankoraŭ ofte estas uzata inter la homoj), kiu fariĝis fremda lingvo (kiel la franca, germana, hispana, araba, ĉina ktp.).¹⁶⁹

Aŭstralio kaj Oceanio

De la takseble 800 indiĝenaj lingvoj, kiuj ekzistis en la malfrua 18a jarcento en Aŭstralio, restis komence de la 21a jarcento malpli ol 150, kiuj eĉ riskas malaperi kaj fariĝi forgesataj. La ĉefa kaŭzo por tiu amasmortado de indiĝenaj lingvoj konsistas en la politiko de la aŭstralia registaro, kiu celis neniigi kaj estingi en la 20a jarcento la kulturojn kaj lingvojn de siaj indiĝenaj popoloj, nomataj *aborigenoj*.¹⁷⁰ Iliaj lingvoj estis pli kaj pli anstataŭigitaj per la angla lingvo kaj estis uzataj ĉiam malpli ofte en la ĉiutaga vivo de la homoj. Intertempe okazas klopodoj por savi la lingvojn de la aborigenoj de la definitiva malapero. Oni enkondukis dulingvan edukadon, okazigas prelegojn *en* la minacataj lingvoj, la indiĝenaj lingvoj estas uzataj en oficialaj ceremonioj kaj esplorataj de sciencistoj aŭ kodigitaj en gramatikoj kaj vortaroj.

Aparte minacata estas la ekzisto de la aborigenaj popoloj kaj lingvoj de *Yanyuwa* kaj *Awabakal*, kiujn parolas nur 5-10 homoj, sed ankaŭ tiuj de *Pitjantjatjara*, *Warlpiri* kaj *Wagiman*, kiujn parolas tamen po kelkmil homoj.

Menciinda estas la sorto de parolanto de la lingvo de la *Martuthunira*- aŭ *Mardudunera*-popolo en Aŭstralio. Li lernis la lingvon de la geavoj, kun kiuj li kaŝiĝis en malfacile alirebla regiono por tie eskapi la kutiman praktikon de la perforta deportado de „miksitaĵ“ infanoj en internigajn hejmojn.¹⁷¹

La fama *maoria* popolo estas sufiĉe granda kaj etendiĝas tra multaj landoj: **Novzelando** (734'200 parolantoj en 2017), **Aŭstralio** (142'107 en 2016), Britio (ĉ. 8000 en 2000), Usono (ĉ. 2000), Kanado (1300), aliaj landoj (ĉ. 8000). Kvankam post decida referendumo de 1967, post kiu la aŭstralia konstitucio estis ŝanĝita por agnoski la ekziston de la ekzistado de la indigenaj popoloj de Aŭstralio kaj la aborigenojn kiel civitanojn de Aŭstralio, la maorioj estas dŭure diskriminaciaj kompare kun la naciaj plimultoj, kiuj loĝas en la koncernaj landoj.¹⁷² Ili alfrontas signifajn ekonomiajn kaj sociajn obstaklojn kaj ĝenerale havas pli malbonajn vivperspektivojn kaj materiajn enspezojn ol la etnaj grupoj, kiuj formas la naciajn plimultojn. Inter maorioj ekzistas pli alta grado de krimeco, sanproblemoj kaj eduk-klerigaj malavantaĝoj. Lige kun diversaj plendoj flanke de la maorioj, la registaroj de Novzelando kaj Aŭstralio iniciatis kampanjojn por plibonigi ilian vivon.¹⁷³

En Oceanio, praktike elmortinta estas la lingvo *Araki*, kiu ankoraŭ estas uzata de malpli ol dek homoj sur la insulo **Vanuato** (aŭ Vanuatuo). Interese en tiu kazo estas, ke la lingvo Araki estas pli kaj pli forpuŝata de la lingvo *Tangoa*, kiu estas alia indiĝena lingvo uzata sur la najbara insulo **Espiritu Santo**. Precipe geedziĝoj kun loĝantoj de aliaj insuloj kaj la lerneja sistemo kontribuas al la pereado de Araki, ĉar la loĝantoj de Vanuato dependas de instruistoj de aliaj insuloj, kiuj ne scipovas la lingvon

¹⁶⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Iranische_Völker.

¹⁶⁸ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Afghanistan#Sprachen>.

¹⁶⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Karakalpak_language kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Uzbek_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=ciyvJyujwOg>.

¹⁷⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Indigenous_Australians.

¹⁷¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Martuthunira_language, https://en.wikipedia.org/wiki/Mardudunera_people.

¹⁷² Vd. <https://www.srf.ch/news/panorama/die-ureinwohner-haben-genug-von-unrecht-und-rassismus>.

¹⁷³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Māori_people; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=hnzZCYoqLiY>.

Araki kaj instruas en la lingvo **Bislama**, kiu estas angla kreola lingvo. Ankaŭ la eklezio kontribuis al la neglekto de Araki, ĉar la diservoj okazas nur en la du aliaj menciitaj idiomoj.¹⁷⁴

Sur la **Marŝalaj insuloj** estas parolata la **marŝala lingvo**, kiu apartenas al la malaj-polineziaj lingvoj. Ĉi tiu lingvo, kiu ekzistas en du dialektoj, **Ralik** kaj **Ratak**, estas parolata de 44 mil homoj sur la insularo mem kaj de kelkmil ekster ĝi kaj ĝuas grandan popularecon.¹⁷⁵ Al la sama lingva familio ankaŭ apartenas la lingvoj **Pohnpei** kaj **Chuuk**. Pohnpei estas parolata de ĉirkaŭ 30 mil homoj sur la samnoma insulo, kiu estas parto de la **Karolinaj insuloj** kaj de 10-15 mil homoj en **Usono**, **Havajo** kaj **Guamo**.¹⁷⁶ La lingvo Chuuk (aŭ **Truk**) estas aŭstronezia idiomo, kiu estas parolata sur la samnoma insulo kiel parto de la Karolinaj insuloj, kiuj apartenas al la Federacio de la Ŝtatoj de **Mikronezio**. Sed ĝi estas parolata ankaŭ sur la insulo Pohnpei, en Guamo kaj Havajo de entute 46 mil homoj.¹⁷⁷

Fine kelkaj vortoj pri la **tahitia** lingvo, kiun la indiĝenoj nomas *Reo Mā'ohi* kaj *Reo Tahiti*. Temas pri polinezia lingvo, kies plimulto de parolantoj (ĉ. 150 mil) vivas sur la **Societaj insuloj** en **Franca Polinezio**.¹⁷⁸ Leksikaj similecoj de tiu lingvo ekzistas kompare kun la havaja kaj rarotonga.¹⁷⁹ La disvastiĝo de la tahitia lingvo en la elektronikaj kaj presitaj amaskomunikiloj estas tre limigata. Malgraŭ tiu manko tiu lingvo tamen ludas gravan rolon kiel komerca komunikilo.¹⁸⁰

Norda Ameriko

Kvankam en **Usono** ekzistas leĝo por protekti lingvojn, la situacio de la indiĝenaj lingvoj estas altgrade zorgiga. Laŭ la Instituto por Indiĝenaj Lingvoj en Santa Fe, ŝtato Nova Meksiko, inter 1997 kaj 2009 elmortis pli ol 20 lingvoj ĉefe pro maljuniĝo de la koncernaj parolantoj kaj pro tio, ke la maljunuloj ne plu pludonis siajn lingvojn al la junaj generacioj.

En la kazo de Usono ni pli proksime rigardu la ekzemplojn de la **apaĉoj**, **navajoj**, **siuoj**, **ĉejenoj** kaj **irokezoj**, la famaj indianaj triboj el internacie konataj romanoj kaj filmoj.

La **apaĉoj** (propra nomo: *Dinneh Tinneh Inde*), kiuj esence loĝas en la ŝtatoj **Arizono** kaj **Nova Meksiko**, estas la kolekta nomo por aro da indianaj popoloj kiel **Chiricahua**, **Kiowa**, **Jicarilla**, **Lipan**, **Mescalero** kaj la **okcidentaj apaĉoj**. Kvankam la lingvoj de tiuj triboj, kiuj apartenas al la familio de la **Atapaskoj**, estas tre similaj, ĉar parencaj, ili estas tre malsame prononcataj, tiel ke la unuopaj triboj ne povas kompreni unu la aliajn. De la multnombraj dialektoj nuntempe estas parolataj nur **Kiowa** kaj **Lipan** de malmultaj homoj, tiel ke tiuj idiomoj estas elmortontaj. Laŭ la censo de la jaro 2000 ekzistas 96'800 anoj, sed nur 15 mil parolas la apaĉan lingvon.¹⁸¹

Al la Atapaskoj fakte apartenas ankaŭ la **Navajoj** (kiuj mem nomas sin *Diné* kaj sian lingvon *Diné Bizaad*), da kiuj ekzistas ĉirkaŭ 300 mil, de kiuj la duono parolas la propran lingvon. Kvankam la patrujo de la Atapaskoj verdire estas Kanado kaj Alasko, la navajoj de Usono esence vivas en la ŝtatoj **Utah**, **Nova Meksiko** kaj **Arizono**. Ankaŭ ilia lingvo estas minacata, ĉar tendence la junularo lernas la anglan lingvon, precipe en la urboj, sed ankaŭ en la rezervejoj. Ekzistas klopodoj revivigi la navajan lingvon, ekzemple pere de lingvokursoj, kiuj estas organizataj de la „Navaja Lingva Akademio“, kiu havas sian sideojn en Window Rock, Arizono.¹⁸²

La tria granda tribo estas la **siuoj**, pli bone konata kiel **Sioux** kun 153'360 anoj laŭ la usona censo de la jaro 2000 kaj kun 33 mil parolantoj en Usono kaj Kanado kune. La siuoj mem nomas sin **Dakota**, kio signifas „amikojn“ aŭ „aliancantojn“. Iliaj idiomoj nomiĝas aŭ **Dakota** aŭ **Lakota** aŭ **Nakota**,

¹⁷⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Araki_language, https://en.wikipedia.org/wiki/Tangoa_language, <https://en.wikipedia.org/wiki/Bislama>.

¹⁷⁵ Ekzemplojn de la Marŝala lingvo vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=VziOp3PgBDs>.

¹⁷⁶ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Pohnpeian_language.

¹⁷⁷ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Chuukese_language; Ekzemplon de la lingvo Chuuk vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=xfz351RktCM>.

¹⁷⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Society_Islands.

¹⁷⁹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Rarotonganische_Sprache.

¹⁸⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Tahitianische_Sprache

¹⁸¹ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Apache>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=mO6jcgwJXWE>.

¹⁸² Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Navajo>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=SUx-GFz4Sp8>.

kies diferencoj konsistas en la prononco de vortoj laŭ la literoj D, L aŭ N: laŭ tio, la vorto „birdo“ varias kiel „zintkada“ (Dakota), „zintkala“ (Lakota) aŭ „zintkana“ (Nakota). La historia konscio de la siuoj estas influata de la nacia traŭmato, kiam dum la indianaj militoj meze de la 19a jarcento ili estis venkitaj de la koloniistoj. Ĝi havis daŭrajn sekvojn ĝis nun: Multaj tribanoj perdis la memfidon pri sia kultura heredaĵo kaj pri si mem kaj multaj kredas, ke la usonanoj ne estus povintaj trompi ilin dum la intertraktoj, se ili estus scipovintaj la anglan lingvon. Tiel ili permesis, ke iliaj infanoj estis senditaj al specialaj lernejoj ekster la rezervejoj, kiuj havis la celojn asimili la indianajn infanojn. Tiuj lernejoj ofte estis gvidataj de ekleziaj misiistoj. La infanoj ne rajtis uzi sian lingvon, devis partopreni en kristanaj diservoj kaj estis perforte fremdigitaj rilate al siaj kulturo kaj lingvo. Pluraj generacioj de siuoj do kreskis malproksime de siaj gepatroj kaj komunumo sen ajna ebleco pludoni sian lingvon al la propraj idoj. La tuta tradicia sciaro de la indianoj, kiu estas mondfama kaj legendeca, baldaŭ malaperos pro la morto de la maljunuloj, kiuj ankoraŭ disponas pri ĝi, malgraŭ klopodoj savi tiun trezoron per revivigo de la lingvo kaj kulturo de la siuoj kaj per iuj lernejaj programoj. La celo estas atingi, ke ĉiu sia infano scipovu la propran idiomon kiel unuan hejman lingvon aŭ kiel duan lingvon en la lernejo kaj utiligu ĝin kiel normalan denaskan aŭ ĉiutagan lingvon. De 1983 en Suda Dakoto ekzistas radioelsendoj en la sia lingvo.¹⁸³

La *ĉejenoj* (aŭ *ŝajenoj*) estas indiana tribo en Nordameriko, kies prauloj iam vivis en la okcidento de la Grandaj Lagoj. Sub la premo de aliaj, arme superaj indianaj triboj, ili devis forlasi tiun regionon kaj formigri okcidenten kaj sudokcidenten (18a jarcento). En 1924 la ĉejenoj fariĝis usonaj civitanoj. Ekde la 70aj jaroj Usono permesis al ili denove praktiki la propran animisman religion. Tio helpis al tiu indiana tribo reakiri sian memkonscion kaj repraktiki la proprajn tradiciojn kaj morojn. Nuntempe la nordaj ĉejenoj vivas en la sudoriento de la usona ŝtato **Montana** en rezervejo. La sudaj ĉejenoj vivas en la okcidento de la ŝtato **Oklahomo**, kie ili posedas la oficialan statuson de federacie agnoskita tribo. Fakte temas pri kompare malgranda popolo: En 1750 oni taksis 3500 anojn, en 1904 1900 sudajn kaj 1400 nordajn ĉejenojn. Laŭ la censo de 1990 ekzistis 6591 ĉejenoj, de kiuj 1721 parolis sian lingvon, kiu apartenas al la *Algonkina* grupo. La tuta nombro de ĉejenoj kaj arapahoj estis 12'130 en la jaro 2008.¹⁸⁴

Praktike elmortintaj estas la lingvoj de la diversaj *irokezaj* triboj de Nordameriko. Oni taksas, ke nur kvin procentoj de la irokezaj praloĝantoj regas la idiomojn de siaj prauloj. Al la ĝis nun konataj irokezaj idiomoj apartenas *Tuscarora*, *Onondaga*, *Seneca*, *Oneida*, *Mohawk*, *Cayuga* kaj *Cherokee* (aŭ *Tsalagi*), dum multaj aliaj jam elmortis aŭ estas elmortantaj, kiel la lingvo *Cayuga* (aŭ *Goyogo*), kiu estas parolata de ĉirkaŭ cent homoj en la usona ŝtato **Novjorko** kaj en la kanada provinco **Ontario**. Komence de la 19a jarcento la indiano Sekvojo (Sequoyah) kreis propran silaban skribon por la lingvo *Cherokee*, kiu estas uzata ĝis nun. Tsalagi estas la sola sudirokeza lingvo, kiu ankoraŭ ne elmortis.¹⁸⁵

Kiu kredas, ke la *havaja* lingvo sur la insularo de **Havajo** estas plene prospera nacia lingvo, tiu bedaŭrinde eraras. Kvankam de 1978 dank' al la konstitucio ĝi estas oficiala lingvo de tiu usona ŝtato kune kun la angla, la ekzisto de la havaja lingvo tamen estas esence minacata. Ĝia uzado reduktiĝis de 37 mil parolantoj en la jaro 1900 al nuntempe mil parolantoj. Intertempe, la nombro de parolantoj de la havaja lingvo tamen denove iom kreskis. Tre populara estas la havaja muziko, reprezentata de konataj havajlingvaj kantistoj (kiel Israel „Iz“ Ka'ano'i Kamakawiwo'ole, kiu vivis de 1959 ĝis 1997).¹⁸⁶

La proksimume 700 mil civitanoj de **Kanado**, kiuj konsideras sin indianoj, 565 mil apartenas al pli ol 600 triboj, kiuj estas ŝtate agnoskitaj (2014).¹⁸⁷ De ili ĉirkaŭ 200 mil vivas en la provinco **Brita Kolumbio**. Nur ili estas jure konsiderataj kiel indianoj (aŭ praloĝantoj) laŭ la kriterioj de la kanada ministerio de la aŭtoktonaj popoloj,¹⁸⁸ dum ĉirkaŭ 133 mil, kiuj apartenas al neniu tribo, ne ĝuas tiun statuson. La plimulto de la indianaj triboj de Kanado vivas en specialaj rezervejoj (entute ĉirkaŭ 3000), kiuj ekzistas dise tra la vastaj kanadaj pro-vincoj. Multaj indianoj loĝas ankaŭ ekster tiuj rezervejoj. La

¹⁸³ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Sioux>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=tbDJ3sEHDqW>.

¹⁸⁴ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Chevenne>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=p27lZiNxlx8>.

¹⁸⁵ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Iroquois>; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=D5mTvONw7sc> kaj <https://www.youtube.com/watch?v=kvEs8K4E7LU>; skribo: vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Cherokee_syllabary.

¹⁸⁶ Ekzemplon de la havaja lingvo vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=vn7dZE-0cDI>.

¹⁸⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_in_Kanada_anerkannten_Indianerstämme.

¹⁸⁸ Temas pri la Ministerio de la aŭtoktonaj aferoj de Norda Kanado, vd. https://fr.wikipedia.org/wiki/Affaires_autochtones_et_du_Nord_Canada.

anoj de la t.n. „Unuaj Nacioj“¹⁸⁹ parolas kvindek da indiĝenaj lingvoj kadre de deko da lingvaj familioj. En 1996, 147 mil parolantoj apartenis al la lingva familio de la *Algonkin*-oj, kiuj plej ofte parolas la *krian* lingvon (Cree).¹⁹⁰ 20 mil apartenis al la familio de la *Atapask*-oj.

Ankaŭ en **Kanado** la lingvoj de la „Unuaj Nacioj“ estas altgrade minacataj. En 1996 nur la lingvoj de la *Cree*-oj,¹⁹¹ *Ojibwe* (aŭ *Aniŝinab*)-oj¹⁹² kaj *Inuktit*-oj (vd. sube) estis konsiderataj kiel pluvivipovaj, kvankam ekde la 70aj jaroj ekzistas klopodoj por konservi la indiĝenajn lingvojn. Tiuj klopodoj baziĝas ofte sur la laboro de malmultaj individuoj, kiuj agadas plej diversmaniere.¹⁹³

Nature, precipe la angla kaj franca lingvoj forpuŝis/as indiĝenajn lingvojn ankaŭ en Kanado. Malgraŭ tio, la uzado de indiĝenaj lingvoj lastatempe tamen denove kreskis. En 2006 51 procentoj de la loĝantoj de la rezervejoj indikis en la censo, ke ili scipovas sian indiĝenan lingvon. En la urboj ili estas tamen nur 12 procentoj. De la pli ol 75-jaraj homoj 18 procentoj indikis, ke ili uzas nur sian originan lingvon. Inter la infanoj 21 procentoj sub 14 jaroj denove parolas ĝin, dum 39 procentoj de la infanoj en la rezervejoj kaj 6 procentoj en la urboj vere scipovas ĝin. De la 15-24-jaraĝuloj 24 procentoj denove parolas sian originan lingvon. En septembro 2008 iu *Aniŝinabeka* grupo¹⁹⁴ en **Ontario** deklaris, ke ĝi preferas uzi sian originan lingvon anstataŭ la angla.

Interesa lingva fenomeno en Kanado estas la miksataj lingvoj. Tiel ekestis la lingvo de la *metisoj*, la t.n. *miĉifa*,¹⁹⁵ kiu estis formita esence de la lingvoj de la krioj (*Cree*) kaj aniŝinabekoj kaj la franca lingvo. Ĝi estas parolata de 5 mil homoj en **Manitobo** kaj **Norda Dakoto**. La *Bungee*- (bungĝi) lingvo similas al la *miĉifa*, sed estas miksaĵo el la kria kaj skota kelta lingvoj kaj estas parolata esence laŭlonge de la Ruĝa Rivero en la provinco Manitobo.

Inuitoj estas nomataj la arktaj indiĝenaj praloĝantoj, kiuj esence vivas en centra kaj nordorienta **Kanado** kaj **Gronlando**, kiuj estas parto de la familio de la tiel nomataj “*eskimoj*” kiel ĉefkategorio por nomi ankaŭ la parencajn grupanojn de la *Kalaallit*-oj (en Gronlando), *Iñupiat*-oj (en Nordalasko) kaj *Jupik*-oj (ambaŭflanke de la Beringa Marstrato). *Inuit-Inupiaq* estas nomata la orienta lingvogrupo de la eskima lingvaro, kiuj estas dividata laŭ kvin dialektgrupoj. De tiu *Inuktitut* (kun ĉ. 40 mil parolantoj) estas nomata la orientkanada dialektgrupo, kiu ekzistas precipe en la kanadaj teritorioj **Nunavut** kaj **Nunavik** (parto de norda Kebekio), kie ĝi funkcias kiel oficiala lingvo, sed havas parolantojn ankaŭ en aliaj provincoj de Kanado. Unu el la dialektoj nomiĝas *Inniunaqtun* (kun ĉ. 1000 parolantoj laŭ la Unesko-atlaso), kiu estas kune kun Inuktitut oficiala lingvo de Nunavut. Alia dialekto, *Inuvialuktun*, aldonigas kiel tia lingvo en la Nordokcidentaj Teritorioj de Kanado. La (sola) oficiala lingvo de **Gronlando** nomiĝas *Kalaallisut* kaj estas parolata laŭ diversaj dialektoj de ĉ. 57 mil personoj (inkluzive Danlando). Laŭ nombro de homoj do entute ekzistas preskaŭ 149 mil inuitaj eskimoj, kaj laŭ landoj troviĝas: en Kanado ĉ. 65 mil (2016), en Gronlando 50 787 (2017), en Danlando 16 470 (2018) kaj en Usono (precipe Alasko) 16 581 (2010). La inuitoj, kiuj kun la jupikoj estas la posteuloj de la lasta grupo (*Sivullirmiut*), kiu venis el Azio trans la Beringa Maro al Nordameriko antaŭ proksimume 10 mil jaroj, ne estas konsiderataj kiel proksimaj parencoj de la indianoj, sed eble tamen nur ties tre malproksimaj.¹⁹⁶

Lige kun la indiĝenoj de Kanado lastatempe furoris tri misteraj incidentoj, kiuj havas la karakteron de skandaloj. La unua kazo koncernis la devigajn *infanadoptojn* dum la jaroj 1960-80aj, de kiuj 20 mil kanadaj praloĝantoj estis koncernataj, al kiuj la ŝtato devas repagi monrekompencojn.¹⁹⁷ La dua skandalo rilatis al serio de *suicidoj* en iu indiana rezervejo en Kebekio, pro kio laŭdire kulpas la

¹⁸⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/First_Nations.

¹⁹⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kria_lingvo.

¹⁹¹ Vd. <https://www.youtube.com/watch?v=tRtwbHBbVbY>.

¹⁹² Muzikan ekzemplon vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=P8dMtCFo24o>; Ekzemplojn de la lingvo Ojibwe vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=dbRc2XkjmPc>.

¹⁹³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/First_Nations.

¹⁹⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Aniŝinabeka_lingvo.

¹⁹⁵ Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Metisoj>, https://eo.wikipedia.org/wiki/Miĉifa_lingvo.

¹⁹⁶ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Inuit>, <https://en.wikipedia.org/wiki/Inuit>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Inuktitut>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Inuinaqtun>, <https://en.wikipedia.org/wiki/Inuvialuktun>, <https://en.wikipedia.org/wiki/Nunavut>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Nunavik>; https://de.wikipedia.org/wiki/Grönländische_Sprache; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=CD1aPSP1uFw>, <https://www.youtube.com/watch?v=QtjIsgxd5o>.

¹⁹⁷ Vd. <https://www.zeit.de/wirtschaft/2017-10/kanada-indigene-voelker-zwangsadoption-entschaedigung>.

„rezerveja sindromo“, je kiu la landaj praloĝantoj suferas kaj kiu estas komparebla kun la situacio de homoj vivantaj en Apartheid-sistemo, kiu malhelpas ilin evolui kaj emancipiĝi. La koncerna raporto parolis pri problemoj kiel senlaboreco, malriĉeco, alkoholismo, droga misuzo, krimo, familia perforto, lernejoj fiasoj kaj suicidoj, kiuj karakterizas la vivon en tiuj rezervejoj, kie la indianoj mizere kaj izolite vegetas jam de 150 jaroj.¹⁹⁸ La tria problemo aktualiĝis lige kun tre mistera fenomeno, kiu temas pri *malperintaj aŭ mortigitaj virinoj* de indiĝenaj popoloj. Pri ĉi tiu dramo komencis serioze okupiĝi la nova registaro de Justin Trudeau en novembro 2015. Laŭ ĉi-koncernaj esploroj, inter 1980 kaj 2012 1017 indiĝenaj virinoj estis trovitaj mortaj kaj 164 senspura malaperis. En 2013/14 estis registritaj 32 mortintoj kaj 11 malaperintoj. Ĉar fakuloj parolas pri pinto de la glacimonto, oni supozas, ke la cifero de viktimoj estas pli granda.¹⁹⁹

Latinameriko (Centra kaj Suda Ameriko)

La latinamerika kontinento estas konsiderata kiel mondoparto, kie la ekzisto de aparte multaj indiĝenaj lingvoj estas draste minacata. Precipe en Amazonio ekzistas sennombraj malgrandaj disloĝitaj indiĝenaj komunumoj, kiuj posedas siajn proprajn idiomojn. Se en **Brazilo** temas pri la *portugala* lingvo, en **Meksiko**, **Venezuelo**, **Bolivio** kaj **Argentino**, kie ekzistas multaj indiĝenaj grupoj, la *hispana* lingvo rapide progresas kaj detruas la pejzaĝon de la minoritata kaj indiĝena lingvaro. La progresado de la hispana kaj portugala lingvoj estas akompanata ankaŭ de ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj. La indiĝenoj ofte ne havas alian elekton ol adopti tiujn lingvojn kaj limigi sian propran idiomon al la familia sfero. Ekzistas neniu dubo, ke tiuj lingvoj malaperos pli malpli frue, kiam la infanoj lernas en la lernejoj la ŝtatan lingvon. En iuj maloftaj esceptaj kazoj, koncernaj apogaj programoj povas helpi al indiĝenaj lingvoj reakiri certan signifon kaj gravecon.

Nahuatl (Mexicatlatolli aŭ *Mexicano*) nomiĝas la ĉefe parolata *azteka* indiĝena lingvo en **Meksiko**. Ekde la jaro 2003 Nahuatl estas kune kun 61 ceteraj indiĝenaj lingvoj agnoskita kiel „nacia lingvo“ de Meksiko kaj la ŝtato devas subteni tiun lingvon por disvastigi ĝin. La nombro de ĝiaj parolantoj kreskas, sed tamen malpli rapide ol la meksika popolo. Laŭ la censo de la jaro 2000 en tuta Meksiko Nahuatl estis parolata de 1'448'936 personoj pli aĝaj ol 5 jaroj, kio estas 1,7 procentoj de la meksikanoj pli aĝaj ol 5 jaroj. En 2010 ĝin parolis verŝajne 1'544'968 personoj, kio estis 1,5% de la loĝantaro. De tiuj 1'348'255 homoj (t.e. 87,27 %) parolis ankaŭ la hispanan lingvon. Laŭ alia cifero, en 2010, 1'586'884 homoj pli aĝaj ol 3 jaroj indikis paroli Nahuatl. 177'666 infanoj 3-9-jaraĝaj parolis tiun lingvon, kio signifis 11,20% de ĉiuj Nahuatl-parolantoj ekde 3 jaroj. Ĉi tiuj tendencoj ĉe la infanoj montras, ke la parto de parolantoj de Nahuatl en Meksiko malkreskas, ĉar la infanoj estas instigitaj lerni la hispanan por havi pli bonan perspektivon en la lernejo kaj vivo, dum Nahuatl limiĝas al la uzado en la hejma uzado.²⁰⁰

Kiel ambivalenta estas la situacio de la *majaaj* lingvoj en Centra Ameriko, ilustras la kazo de la lingvo *Itza' Maya* en **Gvatemalo**, kiu estas parolata ankoraŭ de malmultaj homoj! Kelkdeko da homoj uzas tiun ĉi lingvon kiel duan lingvon. En pli fruaj tempoj ĉi tiu lingvo estis parolata en la tuta nordo de Gvatemalo. Ĝi estas parenco de la lingvo *Yucatec Maya*, alia lingvo de la regiono, kiu estas parolata de 700 mil personoj. Oni povas diri, ke la lingvo Itza' Maya iĝis viktimo de la hispana lingvo. Feliĉe, la lingvo estis dokumentita: La usona antropologo Charles Andrew Hofling publikigis en la jaro 2000 gramatikon de la lingvo Itza' Maya, kaj vortaron de Itza' Maya-hispana-angla li faris jam en 1997. Pro la malmulteco de denaskaj parolantoj tiuj klopodoj eble venis tro malfrue.²⁰¹

¹⁹⁸ Vd. <https://www.n-tv.de/panorama/Kanadas-Indianer-leben-wie-unter-Apartheid-article19553501.html>, <https://www.blick.ch/news/ausland/kanada-untersuchungsbericht-kanadas-indianer-leben-wie-unter-apartheid-id6053151.html>.

¹⁹⁹ Pli detale vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/Missing_and_murdered_Indigenous_women, <https://www.hrw.org/fr/world-report/2019/country-chapters/325508>, <https://www.tagesschau.de/ausland/kanada-indigene-frauen-voelkermord-101.html>, <https://www.20minutes.fr/monde/2531991-20190603-canada-rapport-denonce-genocide-femmes-autochtones>, <https://ici.radio-canada.ca/espaces-autochtones/1173001/reactions-au-rapport-de-lenfada-un-certain-espoir-de-decolonisation>.

²⁰⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Nahuatl#Heutige_soziolinguistische_Situation.

²⁰¹ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Itza>; https://en.wikipedia.org/wiki/Mayan_languages; lingvajn ekzemplojn en Yucatec Maya vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=0G_7XuJlYZ0.

Simile tragikan sorton travivis ankaŭ la tribo *Pipil* en **Salvadoro**. Tiu popolo ekzistas de mil jaroj en tiu lando kaj en principo havas ĉirkaŭ 200 mil membrojn. Sed nur dudeko da ili ankoraŭ scipovas la propran lingvon, kiu apartenas al la familio de la aztekaj lingvoj. La degenero de tiu popolo komenciĝis en la 1930aj jaroj, kiam la hispana lingvo estis enkondukita en Salvadoron kiel oficiala lingvo. Multaj homoj, kiuj apartenis al la popolo Pipil kaj parolis ties lingvon, estis persekutataj kaj mortigitaj, kaj la uzado de indiĝenaj lingvoj estis oficiale malpermesita. Ĝis tiam 200 mil homoj parolis la lingvon Pipil. Hodiaŭ verŝajne denove pli da homoj scipovas tiun lingvon, sed ili timas konfesi ĝin. Nuntempe disvolviĝas projekto, en kiu partoprenas ĉirkaŭ 3000 personoj, precipe lernejoj, kiuj lernas Pipil kiel duan lingvon por eviti ĝian morton. La *Universala Deklaracio de la Homaj Raitoj*, kiu estis intertempe tradukita al ĉirkaŭ 500 lingvoj, ekzistas do ankaŭ en la lingvo Pipil.²⁰²

Laŭ la censo de 2001 en **Venezuelo** vivis 33 diversaj indiĝenaj popoloj kun pli ol 536 mil anoj. Ili formas 2,3 procentojn de la venezuela popolo. La plimulto de tiuj indiĝenoj vivas en kamparaj kaj tropikaj regionoj en la nordorienta parto de la lando, precipe en la delto de la rivero Orinoko, sed ankaŭ en la suda ŝtato Bolívar ĉe la limoj kun Gvajano kaj Brazilo, en Amazonio kaj en la ŝtatoj Apure kaj Zulia en la sud- kaj nordokcidento de la lando. La plimulto de tiuj indiĝenoj loĝas en t.n. naturprotektaj zonoj ABRAE (Area Bajo Régimen de Administración Especial), kiuj parte estis klasifikitaj kiel monda natura heredaĵo kaj do submetita al speciala administrado. La plej grandaj indiĝenaj popoloj de Venezuelo nomiĝas *Piaroa*, *Warao*, *Yukpa*, *Yanomami*, *Barí*, *Pemó*, *Wayúu*, *Makiritare*, *Panare*, *Pumé*, *Wayúu*, *Karí'ña*. La jura situacio esence pliboniĝis per ŝanĝita konstitucio en 1999 je la favoro de tiuj popolgrupoj. En tiu tempo Hugo Chávez regis la landon kiel prezidento. Artikolo 9 de la konstitucio de Venezuelo determinas la kastilian hispanan lingvon unuflanke kaj la lingvojn de la indiĝenaj popoloj aliflanke kiel oficialajn lingvojn. Tiuj principoj devas esti respektataj en la tuta respubliko, ĉar laŭ la konstitucio ili reprezentas kulturen riĉecon de la nacio kaj de la homaro.²⁰³ Sed la nova ekstremdekstra politika reĝimo de prezidento Jair Bolsonaro, kiu estas subtenata de la armeo, grandfarmistoj kaj evangeliismaj eklezioj kaj kritikata de la maldekstruloj kiel novfaŝisma, ŝajnas fortigi la kontraŭ-indiĝenajn tendencojn.

En **Brazilo** vivas pli ol 500 mil indiĝenoj en 209 popoloj. Kelkaj pli grandaj popoloj estas: *Guaraní* (46 mil),²⁰⁴ *Kaingang* (29 mil), *Yanomami* (19 mil),²⁰⁵ *Terêna* (15 mil), *Kaiwá* (12-14 mil), *Ticuna* (12 mil) kaj *Guajajára* (14 mil).²⁰⁶ La indiĝenoj formas ĉirkaŭ 0,25 procentojn de la tuta loĝantaro de la lando (199 milionoj). La asocio COIAB (Coordenação das Organizações Indígenas da Amazônia Brasileira), fondita en 1989, konsistas el 75 organizaĵoj, kiuj reprezentas 165 indiĝenajn popolojn kaj 204 indiĝenojn en naŭ ŝtatoj. La celoj de tiuj organizaĵoj estas la subteno kaj evoluigo de la sociaj, kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj rajtoj kaj de la aŭtonomeco de la indiĝenaj popoloj de la amazonia regiono en Brazilo. Kvankam la brazila konstitucio de 1988 antaŭvidas la garantiadon de la ekzisto de indiĝenaj teritorioj, tiu proceso estas tamen en danĝero precipe pro la mankanta intereso de la brazila registaro disponigi la necesajn financajn rimedojn. Okazas murdoj, minacoj kaj prirabado de gvidantoj de indiĝenaj popoloj, ankaŭ invadoj de ekstere ne trovis finon, sed male, kreskis je 95 procentoj. Laŭ la raporto de la indiana misia konsilio CIMI estis registritaj 109 kazoj, en kiuj 86 indiĝenaj popoloj estis koncernataj. La enpenetroloj celis precipe ekspluati la tieajn tertrezorojn kiel oron kaj tropikan lignon (precipe aziaj entreprenistoj investis centojn da milionoj da dolaroj en la brazilan lignan industrion). Pro tio en tiuj lokoj ofte okazas perfortaj konfliktoj inter tiuj entreprenoj kaj la koncernata loĝantaro. Pro la konstruado de novaj akvostratoj, digo kaj gastuboj la ekologia sistemo de Amazonio estas parte detruata kaj per tio minacata ankaŭ la tradicia vivmaniero de la indiĝenaj popoloj. Efika kontrolado fare de la brazilaj aŭtoritatoj, kiuj estas fame konataj pro enorma korupto, apenaŭ okazas.²⁰⁷

Ankoraŭ 165 tribanoj de la ŝtato **Mato Grosso** parolas la lingvon *Awetí*, kies ekzisto estas minacata, ĉar la infanoj lernas en la lernejo ne nur la portugalan, sed ankaŭ alian indiĝenan lingvon de

²⁰² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Pipil_language; lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=lihEe15bLo8>; lingvan komparon vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=ec8E7MpKpt0>. Superrigardan mapon pri la indiĝenoj de Centra ameriko kaj Karibio vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Indigene_Völker_Mittelamerikas_und_der_Karibik.

²⁰³ Vd. <http://www.indigene.de/34.html?&L=1>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Venezuela#Sprachen>.

²⁰⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Guaraní_people.

²⁰⁵ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Yanomami>.

²⁰⁶ Aliajn vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/Indigenous_peoples_in_Brazil.

²⁰⁷ Vd. <http://www.indigene.de/27.html?&L=1>.

la regiono, nome la **Kamayurá**-on.²⁰⁸ Fakte, komence de la 1960aj jaroj la samnoma tribo estis preskaŭ elmortinta, ĉar nur kelkajn membrojn nombris ĝia sola vilaĝo ĉe la rivero Xingú. Interterpe, la nombro de la vilaĝanaro denove kreskis, kio signifas, ke la koncerna lingvo dume povis esti savita. Ĉar la lingvo Awetí estas speciala kaj unika, ĝi fariĝis objekto de esploristoj. En la jaroj 2001-5 ekzistis la „Awetí Lingva Dokumenta Projekto“ en la Libera Universitato de Berlino, kiu esploris kaj dokumentis tiun ĉi lingvon. Oni kreis ortografion kaj ellaboris unuan lernolibron, kiu estas uzata en la du nove fonditaj vilaĝaj lernejoj, kio signifas, ke la tieaj infanoj ne devas viziti la lernejon de la proksima urbo, kie ekzistas nur portugallingvaj lernejoj. La projekto estas daŭrigata de la frankfurta universitato. La sukceso de la savo de la lingvo Awetí tamen dependas de la koncernaj vilaĝanoj mem, kiuj riskas perdi la konscion pri la valoro de siaj kulturo kaj lingvo, se ili kunfandiĝas kun la nacia portugallingva socio.

La lingvo **Karo** estas la plej lasta ankoraŭ ekzistanta lingvo de la grupo **Ramarama**. Karo, kiu havas plej diversajn nomojn (*Arara de rondônia*, *Arara karo*, *Arara tupi*, *Ntogapíd*, *Ramaráma*, *Urukú* kaj *Urumí*), estas parolata de 200 membroj de la samnoma tribo, kiu vivas en du vilaĝoj en la sudokcidentbrazila ŝtato **Rondônia** apud la limo kun Bolivio. Karakteriza trajto por tiu lingvo estas ĝia sistemo de ideofonoj, t.e. de onomatopoeziaj vortoj kun specifa leksika signifo por fari rakontojn kaj interparolojn pli buntaj. Malgraŭ la eteco de tiu tribo, ĝiaj anoj ĝuas sufiĉe grandan ŝtatan atenton kaj estas reprezentataj per propra organizaĵo.²⁰⁹

En **Gvajano** vivas ĉirkaŭ 7 mil *Wapishana*, 15 mil *Arawak*, po 5 mil *Akawaio* kaj *Patamona*, 7 mil *Makushi* kaj 200 *Waiwai*. La plimulto de la anoj de tiuj popoloj loĝas aŭ laŭlonge de la marbordo aŭ en la interno de la lando. La rajtoj de la indiĝenoj de tiu iama brita kolonio estas minacataj pro la ekspluatado de tertrezoroj fare de internaciaj konzernoj. La registaro ne hezitis kontribui al la detruado de ĝis nun netuŝitaj arbaroj, kiuj posedas altgradan biologian diversecon, pere de la permeso ekonomie ekspluati tiujn arbarojn, kvankam la koncernaj zonoj estis antaŭvidataj por instali naturparkojn. Ĉar la ŝtato konsideras ĉiujn tertrezorojn, kiuj troviĝas sub la tersurfaco, kiel proprajn, al la koncernataj indiĝenaj komunumoj oni rifuzas kundecidi ĉe la disdono de permesoj por ilia ekonomia ekspluado, kio kaŭzis perfortajn konfliktojn en la pasinteco. La Asocio de la amerikaj popoloj de Gvajano (APA) riproĉas al la registaro de tiu lando lezadon de la rajtoj de la indiĝena loĝantaro kaj endanĝerigon de ĝiaj kultura integreco kaj vivperspektivo.²¹⁰

En **Franca Gvajano**, kie vivas ses indiĝenaj popoloj (*Kali'na*, *Pahikweneh*, *Lokono*, *Wayana*, *Wayapi*, *Teko*) ne eblas ekscii ekzaktan ciferon koncerne la kvanton de la anoj de tiuj popolgrupoj, ĉar la franca registaro ne permesas fari censon, kiu nombrus ankaŭ la anojn de la landaj minoritatoj. Internaciaj organizaĵoj taksas, ke en tiu lando vivas ĉirkaŭ 19 mil indiĝenoj, kio korespondus al 10 procentoj de la tuta loĝantaro. Etnaj minoritatoj ne estas menciitaj en la franca konstitucio, kiu determinis la francan kiel solan oficialan lingvon kaj do malhelpas la efektivigon de reala kaj oficiala multlingvismo ankaŭ en la francaj kolonioj.²¹¹

Surinamo, kiu estas iama nederlanda kolonio kun 400 mil loĝantoj, estas multetna kaj multkultura lando kun indiĝena parto, al kiu apartenas 22-25 mil anoj. La plej signifaj indiĝenaj grupoj nomiĝas *Kari'ña*, *Lo-kono*, *Trio*, *Wayano* kaj *Akurio*. La plimulto de la indiĝena popolo loĝas tradicie kiel kamparanoj, farmistoj, fiŝkaptistoj kaj ĉasistoj. Oficiale, la ekzistado de la indiĝenaj popoloj ne estas agnoskita de la landa registaro. Ili do ne ĝuas apartajn rajtojn nek protektadon kiel indiĝenaj popoloj, malgraŭ la ekzisto de specialaj organizaĵoj, kiuj reprezentas la rajtojn de tiuj etnaj grupoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ la nigraj *Maroon*-komunumoj, kiuj estas posteuloj de fuĝintaj sklavo. Ankaŭ en Surinamo multaj plubarbaraj regionoj estas ekonomie ekspluatataj de internaciaj konzernoj, kio kondukis al la perdo de la indiĝena vivspaco kaj al gravega detruado de la naturo. Surinamo apartenas al la malmultaj landoj de Sudameriko, kiuj ankoraŭ ne subskribis la konvencion n-ro 169 de la Internacia Labororganizo pri la problemoj kaj rajtoj de indiĝenaj popoloj.²¹²

²⁰⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Awetí_language, https://en.wikipedia.org/wiki/Kamayurá_language.

²⁰⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ramarama_language, <http://www.brasilienportal.ch/kultur/ureinwohner-in-brasilien/indio-voelker-brasiliens/arara-de-rondonia>.

²¹⁰ Vd. <http://www.indigene.de/31.html?&L=1>.

²¹¹ Vd. <http://www.indigene.de/30.html?&L=1>.

²¹² Vd. https://www.ilo.org/wcmsp5/groups/public/@ed_norm/@normes/documents/publication/wcms_100900.pdf, <http://www.indigene.de/35.html?&L=1>.

Laŭ la censo de 2005 en **Kolombio** vivas pli ol 1,380 milionoj da homoj, t.e. 3,4 procentoj de la tuta landa loĝantaro, kiuj apartenas al diversaj indiĝenaj grupoj. Ili vivas en 27 provincoj kaj 228 komunumoj dise tra la vasta lando. La plej grandaj indiĝenaj popoloj de Kolombio nomiĝas **Páez** (138'500 anoj), **Guajiro** (100 mil), **Emberá** (49'600) kaj **Zenú** (34'500). La ekzistado de la 85 indiĝenaj popoloj estas konstitucie agnoskita. Kvankam la indiĝenoj de Kolombio sukcesis vaste agnoskigi siajn teritoriajn kaj kulturajn rajtojn, la efektivigo de tiuj rajtoj, kiuj estas garantiataj de la konstitucio, ankoraŭ postulas multan politikan laboron. Tio koncernas ankaŭ la agnoskon de la indiĝenaj idiomoj kiel oficialaj lingvoj. Precipe en Kolombio la indiĝena loĝantaro ege suferis pro la longdaŭra milito inter la maldekstra gerilo FARC, kiu estis subtenata de Kubo kaj Sovetunio, kaj la landa armeo kaj aliaj armataj grupoj kaj drogaj karteloj.²¹³ Aliaj problemoj koncernas la forpuŝadon de indiĝenaj komunumoj pro industria ekspluatado de naturaj tertrezoroj kaj kreskanta plantado de kokao, kio akcelas diversajn formojn de la krimeco.²¹⁴

En **Peruo**, kie vivas 1786 indiĝenaj komunumoj, la plej grandaj estas la **ajmaraoj** kaj **keĉuoj**, kiuj loĝas precipe sur la altebenaĵo. Krom tio, en perua Amazonio vivas ĉirkaŭ 65 diversaj indiĝenaj popoloj kun pli ol 300 mil membroj. Ĉiu popolo havas sian propran lingvon, same siajn tradiciojn kaj vivfilozofiojn. Kvankam Peruo subskribis la konvencion n-ro 169 de la Internacia Labororganizo, estas malfacile por la peruaj indiĝenoj puŝi siajn influon kaj rajtojn, se temas pri la diskutado kun internaciaj entreprenoj, kiuj volas ekspluati tertrezorojn en indiĝenaj teritorioj, ĉar en kazo de dubo la registaro decidas la konflikton. Tiu situacio validis ne nur sub la malnova prezidento Alberto Fujimori (1990-2000), sed ankaŭ sub la socialdemokratia prezidento Alan García Pérez (2006-11), kiu intencis allogi internaciajn konzernojn por labori en la teritorioj de la indiĝenaj popoloj. Per tio estis damaĝitaj kaj detruitaj ne nur multaj bestaj kaj plantaj specioj, sed ankaŭ la tradicia vivspaco de la indiĝenoj. En 2009 indiĝenoj protestis kontraŭ la leĝaj dekretoj, kiuj ordonis la eksproprieton de ilia lando kaj kaŭzis la detruadon de la pluvarbaro pro la kruda interveno de naftaj ekspluatistoj. La registaro reagis per proklamo de la milita stato en la koncernaj regionoj, kaj la blokadoj de la protestantoj estis disbatitaj de la armeo, kio kaŭzis kelkdek mortintojn. En Peruo la asocio AIDSESEP, fondita en 1980, reprezentas la interesojn kaj rajtojn de la indiĝenoj en perua Amazonio,²¹⁵ ofte sen granda sukceso.

La kaŭzo por la iompostioma malaperado de indiĝenaj lingvoj kiel la **Arabela** en **Peruo** estas la sama kiel ĉe aliaj **Záparo**-lingvoj de la regiono. Unue la indiĝenaj popoloj ricevis kontakton kun blankaj koloniistoj kaj kun ili ankaŭ kun ties *malsanoj*, kiuj signifis la pereon por multaj indiĝenaj popoloj. Dum la kaŭĉuka furoro komence de la 20a jarcento multaj indiĝenoj estis sklavigitaj kaj devigitaj lerni aliajn lingvojn, precipe la hispanan. Hodiaŭ la perua ŝtato protektas la indiĝenajn lingvojn, proklamante ilin oficialaj lingvoj en la regionoj, en kiuj ili estas uzataj. Por la Arabela lingvo, kiun parolas ankoraŭ kvindekda personoj, t.e. dek procentoj de la tribanoj, la ŝtato kreis kelkajn instrumaterialojn, ĉar ne ekzistis skribaj verkoj ĝis nun. Krome oni tradukis la Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj en la lingvon Arabela, post kiam lingvistoj inventis alfabeton por tiu lingvo. Krom tio, la Rosetta-projekto, kiu celas dokumenti ĉiujn lingvojn de la homaro, verkis kelkajn tekstojn. Ke malgraŭ tiuj laŭdindaj klopodoj la lingvo Arabela povos esti savita de la elmortado, restas dubinde, ĉar la koncerna popolo fariĝas pli kaj pli malgranda.²¹⁶

Hodiaŭ, la **keĉua**, kiun parolis la **inkaoj**, kun probable pli ol sep milionoj da parolantoj estas la plej ofte parolata indiĝena lingvo de Sudameriko. Inter la lingvoj ĝi okupas la trian rangon post la hispana kaj portugala. Dum por **Peruo**, **Ekvadoro** kaj **Bolivio** ekzistas censaj indikoj, tiaj mankas por Kolombio, Argentino kaj Ĉilio. Por Argentino oni taksas 50-120 mil kaj por Kolombio 5-20 mil parolantoj. Plej multaj keĉulingvanoj (Qichwa) estis nombritaj en Peruo, nome 3,8 milionoj en 2017. Bolivio indikis en 2001 1,7 milionojn da parolantoj (Qhichwa), sed verŝajne temas pri pli ol 3 milionoj da keĉuanoj, kiuj loĝas en tiu lando.²¹⁷ En Ekvadoro la lingva verzio nomiĝas Kichwa kaj servas kiel oficiala lingvo

²¹³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Bewaffneter_Konflikt_in_Kolumbien.

²¹⁴ Vd. <http://www.indigene.de/32.html?&L=1>, <https://www.dw.com/de/koka-anbau-auf-rekordhoch/a-45568573>

²¹⁵ Vd. <http://www.indigene.de/33.html?&L=1>; <https://de.wikipedia.org/wiki/Peru>.

²¹⁶ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Arabela_language, https://en.wikipedia.org/wiki/Záparo_language, <https://www.ohchr.org/En/UDHR/Pages/Language.aspx?LangID=arl>.

²¹⁷ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Quechua>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Kichwa>, Vd. <https://www.ohchr.org/EN/NewsEvents/Pages/UDHR500Translations.aspx>, https://unicode.org/udhr/d/udhr_ppl.html;

en la regionoj, kie ĝi estas uzata. Sed proponoj en la ekvadora parlamento agnoski Kichwa-n kiel tutlandan oficialan lingvon krom la hispana, ĝis nun fiaskis. Laŭ la konstitucio, Kichwa kaj *Shuar* estas oficialaj lingvoj nur por „interkulturaj rilatoj“.

Kun pli ol 40 procentoj **Ekvadoro** havas grandan parton da indiĝena loĝantaro. Temas esence pri 13 popoloj kun propra lingvo, kiuj estas agnoskitaj kiel „naciecoj“. En 1998 la jura situacio por tiuj popoloj ŝanĝiĝis kaj eĉ pliboniĝis. En tiu rilato estis fondita aparta instanco, CODENPE (Consejo de Desarrollo de las Nacionalidades y Pueblos del Ecuador) kun la celo postuli la validecon de la donitaj rajtoj. La nacia indiĝena konfederacio CONAIE atingis la agnoskon de la kolektivaj rajtoj de la indiĝenaj popoloj de Ekvadoro. Per la aktivigo de la propra politika partio „Pachakutik“ (MUPP-NP) la indiĝenoj eĉ fariĝis grava politika faktoro en la lando. La indiĝenoj de ekvadora Amazonio estas organizataj en CONFENIAE, kiu apartenas al COICA (Coordinadora de las Organizaciones Indigenas de la Cuenca Amazonica). CONFENIAE povis atingi sukcesojn lige kun la starigo de dulingva eduka kaj kleriga sistemo. La ĉefaj problemoj kaj konfliktoj en tiu regiono aperis lige kun la ekspluatado de nafto, la malpurigo de la naturo kaj la endanĝerigo de la vivspaco de la indiĝenaj popoloj pro divastigo de monokulturoj.²¹⁸

En Ekvadoro ekzistas ankaŭ la popolo *Tsáchila*, kiu vivas en formo de ĉirkaŭ 200 familioj kun ĉirkaŭ 2300 anoj, kiuj plimulte ankoraŭ parolas sian originan lingvon, en la urbo Santo Domingo de los Colorados kaj ĉirkaŭaĵo. Pro la konstruado de strata infrastrukturo en tiu regiono en la 1950aj jaroj la kulturo de la popolo komencis degeneri. Se pli frue tiu popolo okupiĝis pri ĉasado, fiŝkaptado kaj agrikulturo, nun ĝiaj anoj plantas bananojn, kafon kaj kakaon por la nacia kaj internacia komercoj. Por funkciigi tiun metion oni devas scipovi la hispanan lingvon. Ĉar la Tsáchil-anoj, kiuj estas alloga objekto por turistoj, jam preskaŭ plene kunfandiĝis kun la ekvadora socio kaj precipe kun ĝia ekonomio, oni devas dubi, ke por ilia origina lingvo ankoraŭ troviĝos loko. La nederlanda Max-Planck-Instituto por psiklingvistiko en Nijmegen okupiĝas pri la savado de la indiĝena lingvo *Tsafiki*, kiu estas parolata de la *Tsáchila* popolo.²¹⁹

Tre speciala kazo koncerne la indiĝenojn estas ankaŭ **Bolivio**. Per pli ol 5 milionoj da homoj kaj 37 diversaj popoloj en Bolivio la indiĝenoj reprezentas la plimulton de la loĝantaro, do ĉirkaŭ 41 procentojn de la bolivianoj estas indiĝenoj. Krom la du plej grandaj popoloj *Quechua* (2'899 mil homoj) kaj *Aymará* (1'785 mil),²²⁰ aliaj grandkvantaj popolgrupoj estas *Chiquitano* (184 mil), *Guaraní* (133 mil) kaj *Mojeño* (76 mil). La boliviana indiĝena movado estas la historio de longa tradicio de protestado kaj rezistado, de ŝanĝiĝantaj aliancoj, de marŝadoj kontraŭ la ĉefurbo kaj perforta sufokado kaj subpremado de indiĝenaj rajtoj per la polico kaj armeo. Per obstina batalado kaj insista luktado (ekzemple kontraŭ grandfarmistoj kaj ŝtataj potenc-organoj) la indiĝenoj de Bolivio atingis multajn rajtojn, ankaŭ politikajn. Indiĝenoj estas reprezentataj en ĉiuj politikaj partioj de la lando, unu el la ajmaraoj eĉ fariĝis vicprezidento de la lando (1993 ĝis 1997). Ekde 2006 Evo Morales, kiu mem estas ajmaraa indiĝeno de la altebenaĵo, regas la landon kiel socialisma prezidento.²²¹ La nova boliviana konstitucio de 2009 garantias al la indiĝenoj ampleksajn rajtojn, inter alie aŭtonomecon en la ŝtato kaj agnoskon de la propraj institucioj. Krom tio, ĉiuj indiĝenaj lingvoj estis samrangigitaj kun la hispana lingvo kiel naciaj lingvoj. La nova konstitucio difinas Bolivion kiel interkulturan, plurnacian, malcentrisman ŝtaton kun 37 oficialaj lingvoj. Kvankam Bolivio fariĝis en Latinameriko modela ekzemplo por la traktado de indiĝenaj popoloj kaj ties rajtoj, daŭre okazas perfortaj konfliktoj inter ŝtataj organoj kaj indiĝenoj, kiuj kondukas al lezado de la homaj rajtoj. Granda problemo estas ankaŭ industriaj projektoj kiel la longega gastubo inter Bolivio kaj Brazilo, kiu estis finkonstruita en la jaro 2000. Tiu gastubo tranĉas la bolivian nacian parkon Gran Chaco, la bolivian kaj brazilan marĉon Pantanal kaj la pluvarbaron en sudorienta Brazilo. En 2006 prezidento Morales ŝtatigis per dekreto la naftajn kaj gasajn resursojn de Bolivio. Ĉi tiu dekreto devigas la eksterlandajn entreprenojn transdoni sian produktadon al ŝtata asocio YPFB (Yacimientos

lingvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=-PAORn2KAso>;
https://en.wikipedia.org/wiki/Shuar_language.

²¹⁸ Vd. <http://www.indigene.de/29.html?&L=1>.

²¹⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tsafiki_language, <https://www.stern.de/panorama/wissen/natur/bedrohte-sprachen-die-sprachensammler-3066486.html>.

²²⁰ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Aymara_\(Sprache\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Aymara_(Sprache)); linvajn ekzemplojn vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=Cc3mLj0PStU>.

²²¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Evo_Morales.

Petrolíferos Fiscales Bolivianos), kiu kontrolas la eksportadon al eksterlando. Nature, multaj internaciaj firmaoj estis ŝokataj kaj ĉagrenataj.

En **Paragvajo** estas parolataj dudeko da lingvoj, inter kiuj la lingvo **Guaraní** estas la plej vasta indiĝena idiomo. Laŭ la konstitucio de 1992 ĝi havas kune kun la hispana lingvo oficialan statuson. Laŭ la censo de 2002, preskaŭ 4 milionoj da homoj (85,9 %) uzis ĝin kiel unuan lingvon, 2,6 milionoj (58,3%) kiel duan lingvon. La hispanan parolis entute 3 milionoj da homoj (69,6 %), de kiuj nur 506 mil (11,1%) uzis ĝin kiel unuan kaj 2,6 milionoj (58,3%) kiel duan lingvon. Krome, 7,2% (aŭ 326'496 personoj) parolis la portugalan lingvon. La anglan parolis 97'542 personoj (2,1%) kaj la germanan 59'166 personoj (1,3%).

Lige kun la germana lingvo en Paragvajo kaj ĝia kompakta germandevena loĝantaro, menciindas jena interesa historio. Ĉe kvin ĝis sep procentoj de la paragvaja loĝantaro temas pri enmigrintoj kun germana deveno, de kiuj 1838 personoj ankoraŭ naskiĝis en Germanio (2002). Dum la regadotempo de la germandevena diktatoro Alfredo Stroessner, kiu okupis la oficon de la ŝtatprezidento inter 1954 kaj 1989, enmigris en Paragvajon dekmiloj da **germandevenaj brazilanoj**, ekzemple 42 mil nur en la jaroj 1973/74. Precipe en la departementoj Alto Paraná, Itapua, Canendiyú, Caaguazú kaj San Pedro loĝas pli ol cent mil germandevenaj brazilanoj. Alia centro de la germanbrazila enmigrado estas la kolonio „Hohenau“ ĉe Encarnación, kie vivas 30-35 mil germandevenaj brazilanoj. Post la falo de Stroessner aldoniĝis pliaj 150 mil germandevenaj brazilanoj el Sudbrazilo. En 2005 estis fondita nova germanbrazila kolonio en „Neufeld“ en la departemento Caazapá, kie ekloĝis **germandevenaj rusoj**. Krom tio, apud la limo kun Argentino vivas ankaŭ multaj homoj, kiuj originas el Pollando kaj Ukrainio.

La nombro de germanbrazilanoj en Brazilo mem kutime varias inter 2 kaj 5 milionoj, sed oni taksas, ke ĝis 12 milionoj da brazilanoj havas germanajn radikojn aŭ praulojn. Proksimume 600 mil, laŭ aliaj fontoj ĝis 1,5 milionoj da brazilanoj havas la germanan kiel gepatran lingvon aŭ komprenas ĝin pli malpli bone, sed apenaŭ plu parolas ĝin, ĉar kutime ili uzas la portugalan kiel ĉiutagan lingvon. Tamen, inter germanaj koloniistoj estas utiligataj kelkaj 'ekzotaj' germanaj dialektoj.²²²

Krom la lingvo **Guaraní**, en Paragvajo aliaj indiĝenaj lingvoj estas parolataj de 59 mil personoj (1,3%), de kiuj 55'876 (1,2%) parolas ilin kiel unuan kaj 2726 (0,1%) kiel duan lingvon. Do, temas pri sufiĉe malgrandaj grupoj. Tamen, entute ĉirkaŭ du procentoj (t.e. ĉ. 112 mil personoj) apartenas laŭ la censo de 2012 al la indiĝena loĝantaro de Paragvajo, kiuj dividiĝas laŭ 19 triboj, inter kiuj estas registritaj la popoloj de **Avá-Guaraní**, **Pái tavyterá (Caiuá)**, **Mbyá** kaj **Aché**. Al la ĉi-lastata popolo apartenas ĉ. 1000-1500 personoj, kiuj vivas en orienta Paragvajo. Dum la regado de Stroessner en la 1970aj jaroj tiu popolo estis forpelita de sia patrujo en la departemento Alto Paraná kun la rezulto, ke dum tiu forpelado kaj translokado pereis 38% de la Aché-anoj. En la jaro 2000 multaj anoj revenis en sian originan landon.²²³

Fine, ankaŭ en **Ĉilio** ekzistas kelkaj indiĝenaj lingvoj, kiuj estas jenaj:

Mapudungun: Ĉi tiu lingvo estas parolata en centra kaj suda Ĉilio de pli ol 114 mil de 700 mil homoj, kiuj apartenas al la popolo Mapuche (aŭ **Pewenche**).²²⁴

Keĉua: Ĉirkaŭ 8200 ĉilianoj, kiuj vivas en la nordorienta altebenaĵo, parolas la ĉilian version de la keĉua lingvo, kiu similas al la sudbolivia versio de tiu ĉi lingvo.

Rapa Nui, kiu havas polinezian devenon, estas parolata de 2500-3500 ĉilianoj vivantaj sur la Paska Insulo, en Tahitio kaj Usono.²²⁵

Huillich: La parolantoj de ĉi tiu lingvo, konata ankaŭ kiel **Chesungun**, vivas en la regionoj de Los Lagos kaj Los Ríos en Ĉilio. 2000 parolantoj de ĉi tiu lingvo, plej ofte maljunaj homoj, vivis en 1982 en la kamparo. Povas esti, ke tiu lingvo intertempe elmortis.²²⁶

²²² Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Deutschbrasilianer>.

²²³ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Paraguay#Sprachen>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Paraguay#Ethnien>.

²²⁴ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Mapuche>.

²²⁵ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Rapanui_\(Sprache\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Rapanui_(Sprache)).

²²⁶ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Huilliche>.

Centra Aymará: La popolo, kiu parolas ĉi tiun lingvon, vivas ĉefe en la partoj de norda Ĉilio. Verŝajne ne plu pli ol mil personoj parolas ĝin en la ĉiliaj provincoj Arica kaj Putre.

Kawésqar (aŭ **Alacalufe**): Ĉi tiu elmortanta lingvo, kiu estas uzata de la samnoma tribo en suda Ĉilio, parolas nur ankoraŭ kelkaj homoj, kiuj vivas precipe sur la ĉilia Wellington-insulo.²²⁷

Aliaj indiĝenaj lingvoj de Ĉilio kiel **Selk'nam**, **Kakauhua**, **Kunza** kaj **Diaguíta** estas konsiderataj kiel forpasintaj.²²⁸

La originaleco de la lingvo **Tehuelche**, kiu estas parolata en suda **Argentino**, konsistas en tio, ke ĝi havas 25 konsonantojn kaj nur tri vokalojn, kiuj estas prononcataj longe kaj mallonge. Krom tio, ĝi disponas pri riĉeco de numeraloj, kiu estas nekutima por indiĝenaj lingvoj; la anoj de la samnoma tribo (kiu havas ĉ. 6 mil anojn) frue kapablis kalkuli ĝis 100 mil. Fakte, oni verŝajne baldaŭ devos diri, ke tiu lingvo estis parolata, ĉar estas konataj nur 4 personoj, kiuj ankoraŭ parolas ĝin.²²⁹

En Argentino vivis aŭ vivas diversaj indiĝenaj (indianaj) popoloj. Nuntempe 22 grupoj estas agnoskitaj kiel indianaj etnoj, sed kun subgrupoj temas pri 25 indianaj popoloj, inter kiuj la plej grandaj estas: **Mapuche** (105 mil anoj), **Kolla** (64 mil), **Toba** (62 mil), **Wichi** (*Mataco*, 36 mil), **Diaguíta / Diaguíta-Calchaquí** (25-26 mil), **Ava Guaraní** (*Chiriguano*s, ĉ. 20 mil anoj), **Guaraní** (18 mil), **Tupi Guaraní** (15 mil), **Huarpe** (14 mil). Ekzistas etnoj aŭ triboj kun nur kelkmil membroj kiel **Comechingón** (5 mil), **Mbyá-Guaraní** kaj **Pilagá** (po 4 mil), **Chorote** (2147), **Omahuaca** (1370) aŭ nur kelkcent kiel **Charrúa** (676), **Sanavirón** (528), **Ona** (*Selk Nam*, 505), **Chulupí** (440), **Tapiete** (484), **Quechua** (343). Tiuj etnoj apartenas al plej diversaj indianaj popolgrupoj kiel la **Quechua**, **Guaraní**, **Arawak**, **Pampeano-Patagónico**, **Mataco-Mataguay**, **Guaycurú** aŭ estas memstaraj popoloj, kiuj ankaŭ parolas la koncernajn indiĝenajn lingvojn.

La taksoj de la nombro de argentinaj indianoj forte varias. La oficiala nombro, kiun la censo de 2010 indikis, estas 955'032 personoj. Ĉi tiu nombro estas la duoblo de la cifero, kiu estis registrita okaze de speciala censo de 2004, nome 403'125. Kelkaj neregistaraj organizaĵoj bazas siajn taksojn je ĝis du milionoj da indianaj argentinanoj. La ĉefa kialo por tiuj diversaj kvantoj estas la malfacilaĵo difini la grupon de „indianoj“. Ĉe la nombro, kiu estis rikoltita el la censo, temas pri personoj, kiuj mem deklaris sin indianoj aŭ rektaj posteuloj de indianoj, dum ĉe aliaj taksoj ludis rolon ankaŭ la origino aŭ kultura karaktero.²³⁰

La **Charrúa**, kiel nomiĝis la ĉefa indiĝena popolo de **Urugvajo**, elmortis jam en la jaro 1830.²³¹

* * *

Konklude: Ĉu do indas okupiĝi kaj zorgi pri lingvoj en Kaŭkazo, Azio, Afriko aŭ Sudameriko, kies morton oni ĉiukaze ne povos eviti? Multaj samtempoj eble demandas sin kial en la epoko de la globaliĝo estu konservataj ekzotaj kaj malfacilaj lingvoj, kiuj estas parolataj de kelkdek aŭ kelkcent homoj kaj kiuj estas minacataj de la elmortado. Ĉu la homaro ne prefere klopodu investi siajn rimedojn en la fortigon de grandaj lingvoj por povi paroli per unusola lingvo anstataŭ miloj da malgrandaj idiomoj, kiuj komplikas kaj malhelpas la internacian komunikadon? Nature, tuj aperus rezisto kontraŭ la rolo de grandaj „koloniismaj“ lingvoj de „imperiismaj“ potencoj kiel la angla, franca, hispana, k.a. (kiuj cetere estas la ĉefaj lingvoj de UN). Kiel ni legis en la supra prezentaĵo, la lingvo estas la ĉefa spegulo aŭ esprimo de ies kulturo. Se aŭ kiam iu lingvo pereas, malaperas kun ĝi kutime ankaŭ ĝiaj esprimformoj por

²²⁷ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Kawesqar>.

²²⁸ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Atacameño>, [https://de.wikipedia.org/wiki/Chango_\(Volk\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Chango_(Volk)), <https://de.wikipedia.org/wiki/Diaguíta>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Picunche>, <https://es.wikipedia.org/wiki/Chiquillanes>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Pehuenche>, <https://en.wikipedia.org/wiki/Puelche>, https://en.wikipedia.org/wiki/Cunco_people, https://en.wikipedia.org/wiki/Poya_people, <https://en.wikipedia.org/wiki/Chono>, https://en.wikipedia.org/wiki/Tehuelche_people, <https://de.wikipedia.org/wiki/Selk'nam>, <https://de.wikipedia.org/wiki/Yámana>.

²²⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tehuelche_language.

²³⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Indigene_Völker_in_Argentinien.

²³¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_südamerikanischer_indigener_Völker; Superrigardan artikolon pri la indiĝenoj de Nordameriko vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Indigene_Völker_Südamerikas.

plantoj, bestoj, lokoj, sentoj, religiaj valoroj (ekzemple la inuitaj eskimoj konas multajn variantojn por „neĝo“²³²). Pri tia dramo ni supre konsciis precipe en la kazoj de la idiomoj de iuj ege praaĵ indigenaj popoloj kaj triboj de Ameriko kaj Afriko, kiuj ankoraŭ ekzistas, sed estas minacataj de la elmortado kaj pereado en la proksima tempo. La koncernaj homoj perdas sian historion kaj la ligan al kaj konscion pri sia origino. La perdo de la lingvo do signifas por ili gravegan perdon de la identeco kaj ne malofte kolektivitan traŭmaton, kiu povas daŭri dum generacioj. Per la morto de iu lingvo la homaro perdas ekzemplojn de la homa pensado, de diversaj eblecoj pensi kaj sin esprimi. Same kiel ĉiu biologia specio kontribuas al la diverseco de la surtera vivo (lastatempe elmortis ekzemple centoj da insektaj specioj²³³), ĉiu lingvo reprezentas unikan trezoron de la esprimkapablo, semantiko kaj spirita vivo. Ankaŭ el antropologia vidpunkto lingvoj havas altan valoron. Tiel oni malkovris ŝajnan parencecon inter la *keta* en la siberia Jeniseja regiono²³⁴ kaj la lingvoj de la navajoj en norda Ameriko. Do, tiu malkovro povus esti la pruvo por la parenceco inter siberiaj kaj nordamerikaj indigenaj popoloj. Aliaj esploristoj vidis parencecon inter iuj kaŭkazaj kaj la eŭska (vaska) lingvo, kaj pri la laŭdira parenceco de la albana kun la iliria lingvo ni jam parolis. Sed ĉar la iliria lingvo elmortis antaŭ longa tempo, tiu teorio ne plu estas pruvebla. Ktp.

La celo de ĉi tiu studo estis montri kialojn de la elmortado de indigenaj lingvoj kaj samtempe menciigi rimedojn kaj klopodojn por savi ilin laŭ la ekzemplo de konkretaj kazoj.

* * *

La historia rolo de la Esperanto-movado kaj ĝiaj rilatoj al etnaj minoritataj kaj indigenaj lingvoj kaj popoloj

Kaj Esperanto ? Esperanto komencis ludi sian rolon, kiam iuj homoj kontraŭstaris la supre menciitan „hegemonion“ de grandaj lingvoj kiel la angla, franca aŭ hispana, kiuj laŭ ili ne taŭgas kiel universalaj lingvoj kaj prefere estu anstataŭigitaj per iu „neŭtrala“ „planlingvo“ kiel Esperanto. Tiu ideo, kiu estis konsiderata kiel „genia“, ja trovis ne malmultajn adeptojn en sennombraj landoj, sed la kompare limigata kvanto de „esperantistoj“ tamen ne sufiĉis kiel politika premgrupo por pravigi la enkondukon de tia idiomo kiel universala („help“-)lingvo, malgraŭ la morala apogo de Unesko, kiu trovas la Esperanto-movadon simpatia.

En la pasinteco la (malkredinda) Esperanto-propagando parolis pri centmiloj aŭ eĉ milionoj da „esperantistoj“. Pli realisme estas, ke nuntempe ekzistas probable maksimume kelk mil personoj en kelkdek landoj, kiuj scipovas Esperanton sur pli malpli alta nivelo aŭ aktivas en Esperanto-organizaĵoj (kie la nivelo de la Esperanto-scipovo kaj la intelekta nivelo entute kutime estas sufiĉe malaltaj). La membro-nombroj de Esperanto-organizaĵoj stagnas, ŝrumpas aŭ eĉ malkreskas de jaro al jaro, sennombraj pli frue aktivaj lokaj Esperanto-societoj malaperis pro manko de membroj kaj aktivuloj kaj pro maljuniĝo de la malnovaj pioniroj, kiuj esence portis kaj vivigis la malnovan Esperanto-movadon. La interreto kun siaj laŭte anoncigitaj lingvo-kursoj por scivolemaj komencantoj ne kapablis anstataŭigi ilin ĝis nun per novaj samtipaj kaj samvaloraj stabilaj kaj daŭraj fortoj, kiuj estas ankaŭ intelekteme produktemaj kaj valoraj. Neniu ŝtato serioze favoras aŭ enkondukis Esperanton, kiu estas instruata ĉefe libervole aŭ fakultative nur en malmultaj lernejoj. La aserto pri la t.n. „propedeŭtika valoro“ de Esperanto, kiu iom furoris en la 1920aj, 50aj kaj 60aj jaroj inter kelkaj pedagogoj, konvinkis neniun gvidan politikiston. Sed ĉi tie ne estas la loko por trakti la kialojn de la fiasko de Esperanto kiel universala aŭ „dua lingvo por ĉiuj“, ĉar ekzistas kaj facile kaj malfacile klarigeblaj faktoroj. Bedaŭrinde, Esperanto estas ankaŭ daŭre (mis)uzata por politika propagando kaj ĵurnalisa misinformado flanke de komunismaj ŝtatoj kiel Ĉinio aŭ Kubo, kvankam kritikistoj ripete atentigis pri tiu problemo.

Ĉu Esperanto do estas ekzist-minacata lingvo kaj baldaŭ elmortos ? Ĉi-lingvo aperas en neniuj statistiko de Unesko, ĉar ĝi ne estas konsiderata kiel etna lingvo aŭ ne ekzistas kiel lingvo entute. Eble la tempo por elmorti ankoraŭ ne venis, kvankam la lingvo estos daŭre praktikata sur kvante kaj kvalite

²³² Pri Inupiaq vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Inupiaq_language kaj <https://www.youtube.com/watch?v=KGuZVi--Cdg>.

²³³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_der_neuzeitlich_ausgestorbenen_Insekten, <https://www.sciencedirect.com/science/article/pii/S0006320718313636>.

²³⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ket_language.

malalta nivelo precipe de turistoj, kiuj ŝatas vojaĝi en la „Esperanto-lando“ kaj partopreni t.n. Esperanto-kongresojn kaj landajn asociajn aranĝojn en novjaro, pasko, pentekosto kaj dum la someraj ferioj. Krom por turistoj, la Esperanto-movado esence esence la (politika) movado de kontraŭ-anglaj lingvaj fundamentalistoj (plej ofte maldekstremaj), kiuj malamas la kapitalismon kaj Usonon. Sed estas klare, ke la Esperanto-movado perdis sian (politikan kaj socian) signifon, kiun ĝi eble iam havis inter pacifistoj antaŭ, dum kaj post la Unua Mondmilito kaj precipe dum la „Malvarma Milito“, precipe en kelkaj komunismaj landoj, kiuj forte radiis al la Esperanto-movadoj de la Okcidento kaj ludis iun efemeran rolon en Katalunio, Irano, Japanio, Brazilo, Svislando aŭ aliloke. En la propra propagando la esperantistoj mem multe troigis kaj supertaksis la gravecon de siaj lingvo kaj movado, dum la monda gazetaro esence dubis pri la neceso de Esperanto, ignorante ĝiajn ideojn aŭ metafore menciante ĝin, kaj nur supraĵe, malkompetente kaj ofte negative aŭ iom moke raportis pri ĝia movado, kiu laŭ sia morfologio estas principe komparebla kun sovetkomunisma politika partio, la katolika eklezio aŭ religia sekto; ĝuste en tiuj medioj la Esperanto-movado ankaŭ rekrutis la plej multajn adeptojn, membrojn, apogantojn, kaj simpatiantojn. La historia malfortiĝo de tiuj politikaj kaj religiaj potencoj havis gravajn kvantajn kaj kvalitajn sekvojn ankaŭ por la Esperanto-movado, kiu praktike perdis siajn signifon kaj konsistecon kaj sur la internacia skalo montras nehaltigeblajn tendencojn de la strukturaj kaj organizaj disfalo kaj dissolviĝo.

Nature, la Esperanto-movado neniam estis vere „grava socia faktoro“, kiu ankaŭ reale meritustian pritakson, kiel la Esperanto-propagando blufe asertis. La aktiveco kaj agado de la Esperanto-movado ĉiam disvolviĝis ene de malgrandaj izolataj grupoj, kies membroj renkontis aliajn asociojn unufoje jare kadre de pli grandaj landaj kunvenoj aŭ internaciaj kongresoj kvazaŭ kiel sub diasporaj kondiĉoj. En tiuj kunvenoj, en kiuj la esperantistoj estis inter si kaj kiujn nur malofte partoprenis „neesperantistoj“ kaj en kiuj ne mankis la laŭta patoso pri la propra supereco (ekzemple kompare kun la angla aŭ aliaj naciaj lingvoj), oni ŝatis festi la „venkon de Esperanto super aliaj planlingvoj“. Povas esti, ke Esperanto montris, ke tiuspeca (artefarita aŭ planita) lingvo kreita „en la laboratorio“ povas plene funkcii (sed ne nepre sukcesi, kio estas alia afero). Certe, la „ekstera mondo“ tro forte ignoris tiun fakton kaj la esperantistoj mem ne sufiĉe serioze utiligis ĝin por fari el ĝi pli gravajn lingvon, movadon aŭ „socian faktoron“, pri kio ili ĉiam revis. Ŝajnas, ke la ideologia fanatiko de la Esperanto-propagando, kiu ja sendube allogis ankaŭ diversajn homojn, kiuj fariĝis signifaj protagonistoj de Esperanto, tamen grandparte kulpas pri tio, ke la „ekstera mondo“ ne sufiĉe serioze konsideris la Zamenhofan projekton, konsiderante la asertojn kaj teoriojn de la esperantistoj, kiuj restis praktike nekonataj al la homaro, malrealismaj kaj nedezirindaj.

Kaj kiu estas la ligo de la Esperanto-movado al etnaj minoritataj kaj indiĝenaj lingvoj kaj popoloj ? Kvankam ankaŭ en Esperanto aperis iuj lernolibroj kaj vortaroj por iuj malgrandaj lingvoj, ekzemple vaska (aŭ eŭska), makedona, ĉeĥa, hungara, islanda, ukraina k.a., la oficiala internacia Esperanto-movado en si mem malmulte aŭ nenion konkretan kontribuis al la apogo aŭ evoluigo de etnaj kaj indiĝenaj minoritatoj aŭ ties „lingvaj rajtoj“, kvankam la esperantistoj volonte fanfaronis, ke ili (morale) subtenas la rajtojn de tiaj minoritatoj kaj lingvoj. La vero estas, ke la Esperanto-movado ĉiam apogis (aŭ silente aŭ rekte aŭ malrekte aŭ kaŝe) la regantajn politikajn reĝimojn en la koncernaj landoj, ĉu komunismajn, ĉu aliajn totalismajn diktaturojn inkluzive la irananojn, se ili montris ian interesiĝon pri Esperanto. En tio oni evitis kritiki la lezadon de la rajtoj de homoj, etnaj minoritatoj kaj indiĝenoj kaj de ties lingvoj, kiel ĝi estis kaj daŭre estas grandskale praktikata en la koncernaj landoj, por ne provoki la koleron de tiuj reĝimoj. Tiu sinteno servis al la preteksto, ke oni volas eviti, ke la koncerna reĝimo persekutu aŭ subpremu la esperantistojn aŭ Esperanto-movadon en la koncerna lando. La principo de la respektado de la homaj rajtoj estas esenca konsistiga ero de la statutoj de la Esperanto-organizaĵoj. Ankaŭ laŭdire pro la „politika neŭtraleco“ neniam iu ajn „oficiala“ prezidanto aŭ reprezentanto de la Esperanto-movado publike kritikis la lezadon de la homaj rajtoj en la komunismaj landoj, ekzemple en Ĉinio, sed ankaŭ en Irano aŭ Hindio, kie tiu lezado estas evidenta, kvankam iuj tiaj movadaj funkciuloj alude palavis pri tiuj temoj. Pozitiva escepto en la Esperanto-movado ĉi-rilate estis la agado de la „Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj“ (IKEL), kiu eldonadis/as la revuon *Etnismo*. Sed oni devas timi, ke tiuj iniciatoj baldaŭ silentiĝos kaj malaperos pro manko de publika interesiĝo, disponeblaj kunlaborantoj kaj financaj rimedoj.

La esperantistoj, kiuj estas malliberigitaj de siaj dogmema ideologio kaj fanatikaj konvinkoj, ĝenerale kulpigas ekskluzive la anglan lingvon pri la elmortado de indiĝenaj lingvoj. Sendube, tiu problemo koncernas precipe anglalingvajn landojn mem kiel Brition, Nordamerikon (Usonon kaj Kana-

don) kaj Aŭstralion-Novzelandon, kies indiĝenaj popoloj ofte estis mizere kaj krime traktataj en la pasinteco, sed ne nepre validas ĝenerale por la cetera mondo. Tiu rigardo de la esperantistoj al la koncerna problemaro do estas tro mallarĝa, pro kio la opinioj, pritaksoj kaj asertoj de la esperantistoj ne povas esti serioze aŭ science konsiderataj, ĉar temas pri pure subjektiva vidpunkto, kiu estas ŝuldata al la propra ideologio por propagandi kaj pravigi Esperanton kaj defendi proprajn movadajn interesojn. Kiel celis montri tiu ĉi studo, por la elmortado de malgrandaj etnaj lingvoj kulpas plej diversaj socikulturaj, soci-politikaj, sociekonomiaj kaj socilingvistikaj kaŭzoj kaj faktoroj, kies trajtoj kaj interrilatoj estas tro komplikaj kaj ampleksaj por esti detale traktataj kaj analizataj ĉi tie. Ili do povas esti nur aluditaj en la kunteksto de la aktuala situacio de lingvoj de etnaj minoritatoj kaj indiĝenoj en elektitaj kazoj kaj landoj.

A. Künzli, majo 2019

Ĉefe utiligataj resursoj:

<https://en.iyil2019.org>

https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_bedrohter_Sprachen

<http://www.unesco.org/new/en/culture/themes/endangered-languages/atlas-of-languages-in-danger>

https://www.gfbv.de/fileadmin/redaktion/Reporte_Memoranden/2010/MR-Report_Nr.63.-BedrohteSprachen.pdf
(kie en la teksto ne estas aparta piednoto)

<https://www.swissbib.ch/Record/23643263X>

<http://www.ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT013306527/PDF>

<https://www.routledgehandbooks.com/doi/10.4324/9780203645659.ch3>

Koncerne la solvon de la -ata-/-ita-demando, mi ĝenerale orientiĝis laŭ la germanlingva modelo (war/wird/wurde depende de la tempo, plej parte pasinteco). Sed la tuta problemo estas komplikata/ita per la dimensioj de la adjektiva, tranzitiva kaj verbaspekta demandoj. Do, restas dubo en kelkaj kazoj (devigita/ata, akompanita/ata, miskomprenita/ata, konsiderita/ata, nomita/ata, imagita/ata k.s.), pri kiuj oni povas verve diskuti.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, majo 2019.

Pri la aŭtoro: nask. en 1962 en Lucerno (Svislando). Studis (1983-91) slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato. Finis la studojn per diplomverkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio. Aŭtoro de la Svisa Enciklopedio Planlingva (2007) kaj de Zamenhof-biografio en la germana lingvo (2010). Vivas en Berno (Svislando). Lernis Esperanton en 1979 kaj estis aktivulo de la Esperanto-movado, kiun li intertempe forlasis pro ideologiaj kaj politikaj konsideroj, sed daŭre praktikas Esperanton, verkante historiografie pri esperantomavadaj, planlingvaj, orienteŭropaj, politikaj kaj lingvaj temoj.

Vd. ankaŭ:

http://www.planlingvoj.ch/Lingvoj_europaj_kaj_Esperanto.pdf

http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2018.pdf